

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 540

NOVEMBRO 1950



GRANDA HERBAJO

Akvareldesegnaĵo de Albrecht Dürer

D-ro L. L. ZAMENHOF

FUNDAMENTAJ VERKOJ DE LA LINGVO INTERNACIA

- FUNDAMENTO DE ESPERANTO** (sen traduko), 36 paĝoj, 1 ŝil., afr. 2p.
FUNDAMENTA KRESTOMATIO 472 paĝoj, 10 ŝil., afr. 9p.

TRADUKOJ (nun haveblaj)

- FABELOJ DE ANDERSEN** (nur vol. IIIa) 153 paĝoj, 4 ŝil. 6p., afr. 4p.
GEORGO DANDIN (triakta komedio de Molière) 52 paĝoj, 2 ŝil., afr. 3p.
IFIGENIO EN TAŬRIDO (tragedio en kvin aktoj de Goethe) 108 paĝoj, 3 ŝil. 9p., afr. 3p.
LA RABENO DE BAĤARAĤ (novelo de Heinrich Heine) kaj
LA GIMNAZIO (monologo de Ŝalom Aleĥem) 1 vol., 68 paĝoj, 2 ŝil. 6p., afr. 3p.
LA RABISTOJ (dramo en kvin aktoj de Schiller) .. 144 paĝoj, 4 ŝil. 6p., afr. 4p.
LA REVIZORO (komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol) .. 99 paĝoj, 3 ŝil. 9p., afr. 3p.

Eldonitaj de

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO, PARIZO

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando

aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Novembro 1950

N-ro 540 (II)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵojn en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.
½ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

NIA SPIRITA HAVAĴO

Internacia lingvo, sen la atributoj de popola lingvo—nome teritorio, kelkcentjara pasinteco, unuvorte la tuta mistiko nacia—devas anstataŭigi ĉi tion per io konservanta kaj kunliganta, kreonta tradicion. Tio estas la *verkado* en periodaĵoj kaj libroj, la literaturo. La impona verkaro ekzistanta kaj daŭre pligrandiĝanta atestas pri la vivo de la lingvo pli ol io alia.

Iam, en la heroeca epoko de nia movado, la apero de nova libro, ĉu originala ĉu tradukita, kaj se ĝi elstaris pro enhavo aŭ amplekso, kreis sensacion inter ni. Simplaj aspektis ja la plimulto de la tiamaĵ libroj kaj nur malrapide ŝanĝiĝis la aspekto. Post 1920 tiu ĉi situacio entute ŝanĝiĝis dank' al diversaj faktoroj, ĝeneralaj kaj ekonomiaj. Utilas foje priskribi la verkaron en Esperanto de vidpunkto eldonista kaj tipografia.

Por konvinki skeptikulon pri la literatura vivo de Esperanto ekzistas nenio pli bona ol la monstro de biblioteko esperantista. Multaj esperantistoj posedas tian kaj tiras el ĝi spiritan ĝuon kaj kontenton de "feliĉa posedanto". Libroj ja estas bonaj amikoj.

Kiel ĉio en la vivo, ankaŭ la eldono kaj vendo de libroj havas siajn ombrojn. Ne ĉiu verko iĝas "plejbonvendulo"—*bestseller* kiel trafe diras angla vorto—kaj aro da malhelpaĵoj komplikas la debiton. Malgraŭ tio la lerteco de la eldonistoj-libristoj sukcesis ĉiam venki ĉi tiujn barojn kaj la eldonado floris.

Hodiaŭ la situacio nun estas tute alia. La izoligo de granda parto de Eŭropo kaj precize landoj por ni plej interesaj, la prez-diferenco tro granda inter aro da landoj, kaj fine la ĉina muro de la internacia montransigo metas la libro-eldonon antaŭ la demandon : "Ĉu esti aŭ ĉu ne esti ?"

La respondon je tiu ĉi vivdemando devas doni la esperantistoj en landoj nekatentitaj. Bonega ideo estis, fiksi "Tagon de la Esperanto-libro". Tiu ĉi *tago* devus esti silente akceptata kiel daŭra de Januaro ĝis Decembro. Daŭre kompletigu vian Esperanto-bibliotekon ; donacu belan esperanto-libron al amiko ; plezurigu serveman delegiton per valora verko ; ĉiel pensu je nia literaturo. Tiel farante vi helpas al niaj eldonistoj eliri el dilemo, kaj ebligas al ili la gravan rolon de la plimultigantoj de la spirita havaĵo de nia lingvo.

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstralio

Sekve de la ondego da leteroj alvenintaj post la radiaj dissendoj okaze de la Tut-Aŭstralia Kongreso en januaro, la Enmigra Instanco interesiĝas pri Esperanto. Okazis pluraj interkonsultigoj inter tiu instanco kaj la gvidantoj de la movado en Ballarat, kie nia afero nun tre viglas. Unu rezulto estas, ke S-ro Brkić—D. de U.E.A.—kaj S-ro Bevan. kreis komitaton por enmigrado de Esperantistoj en Aŭstralio. La nomitaj samideanoj gardas daŭran kontakton ankaŭ kun multaj ekleziaj organizaĵoj.

Brazilo

La Ministerio de Edukado kunlaboras en konkurso de Esperanto por gimnazioj, aranĝita de Brazila Esperanto-Ligo, kaj la Regularo estis dissendata al 1.244 direktoroj de gimnazioj.

En la 7-a de julio 1950 en tre populara programo de *Rádio Nacional*, la oficiala radiostacio de Brazila Registaro, oni intervjuis la novgeedzojn S-ron Ruilaf Van Putten kaj S-inon Nelly Neto Putten kiuj geedziĝis pere de Esperanto. Ĝi estis vigla programero kaj venigis al B.E.L. centojn da leteroj eĉ el malproksimaj lokoj de la lando.

En la 27-a de julio la radioprogramo de *Radio Globo, Conversa em Família* intervjuis la esperantistojn. *Conversa em Família* estas forumo kreita por la diskutado pri gravaj problemoj de la brazila popolo. Oni egale atakas aŭ defendas la registaron, instituciojn, policon k.s. kun absoluta libero. Deko da esperantistoj estis invititaj inkluzive de D-ro Timponi, D-ro Carlos Domingues kaj S-ro I. Gomes Braga. La dissendo daŭris horon kaj duonon.

La "Esperantista Societo de Porto Alegre" en 1950 ricevis de la registaro (Rio Grande do Sul) pere de la Sekretario pri Eduko kaj Kulturo subvencio de tri mil kruzejoj per Dekreto N-ro 1 236, je 1 julio 1950. Per Dekreto N-ro 1 051 je 15 dec. 1949 la ŝtato difinis dek mil kruzejojn por la Societa biblioteko. Krom tiu monhelpo, la Urbeŝtaro de Porto Alegre post raporto de komisiono, aljuĝis al la nomita Societo je 4 aŭg. 1950 la sumon dek mil kruzejojn. Tiuj subvencioj konkrete atestas la simpatian de oficialaj instancoj por nia afero.

Je 17-a julio la Ŝtata Deputito S-ro Rodrigo Magalhaes, de la Laborista Partio, legis en la Parlamentejo raporton pri Esperanto kaj poste longe parolis pri la idealo kaj utilo de tiu lingvo, de kiu li konfesis sin lernanto kaj simpatianto. Li faris deziresprimon pri enkonduko de Esperanto en la duagradaĵoj kaj superaj lernejoj de Brazilo. La parolinto ricevis longan ovacion post lia

nekutima parolado. La parolado aperis poste en la *Parlamentaria Ĵurnalo*.

Kunlabore kun Studenta Centro de la Filozofia Fakultato de la Universitato de Porto Alegre, la tiuloka grupo aranĝis intensan ĉiutagan kurson de Esperanto laŭ Cseh-metodo. Kvindek studentoj trastudis la kurson.

Brazilaj leĝoj pri Esperanto 1949

Kiel en 1948 ankaŭ en la pasinta jaro la Brazilaj oficialaj instancoj subvenciis la Esperanto-movadon. Jen mallonge la detaloj:

Leĝo N-ro 94 (30 junio) de la Komunumo Belo Horizonte, Ŝtato Minas Gerais, kiu donis helpon de 30 mil kruzejoj al la XII Brazila Kongreso de Esperanto;

Leĝo N-ro 102 (5 sept.) de la sama komunumo, kiu donis la nomon *Praça Esperanto* al placo de Belo Horizonte, ĉefurbo de Ŝtato Minas Gerais, ĉe interkruciĝo de stratoj Aimorés kaj Ouro kaj avenuoj Contorno kaj Paraŭna;

Leĝo N-ro 132 (5 okt.) de la Komunumo João Pessoa, Ŝtato Paraíba, kiu donis la nomon *Avenida Esperanto* al la iama avenuo A.B.C. en la ĉefurbo de tiu ŝtato;

Dekreto-leĝo N-ro 159 (10 okt.) de Ŝtato Rio Grande do Norte, kiu rekonis kiel societon de publika utileco la *Associação Potiguar de Esperanto* en Natal;

Dekreto N-ro 618 (15 nov.) de Ŝtato Santa Catarina, kiu permesis la nedevigan instruadon de Esperanto en la normalaj lernejoj kaj institutoj de edukado en la ŝtato.

Britujo

La brita *Independent Labour Party* (Sendependa Laborpartio) invitis la Prezidanton de B.E.A.—S-ron W. A. Gething—prelegi pri Esperanto en ĝia kongreso en Bognor, 31 julio 1950.

La organo de tiu partio, *Socialist Leader* presigas ĉiusemajnan rubrikon en Esperanto.

La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj aranĝas Paskan Lernejon en Folkestone 24–31 marto 1951. Oni kore invitas alilandajn instruistojn partopreni. Necesas frua rezervo de loko. Ĉiujn informojn de F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Anglujo.

Ĉeĥoslovakujo

Post la landa kongreso je Pentekosto, kun partopreno de mil gesamideanoj, 420 personoj venis en kvar somerajn lernejojn de Esperanto por studi la lingvon aŭ perfektigi en ĝi. Okazis du kolegioj en Doksy kaj Svit respektive kaj du

kurs
kalk
konf
oni
pren
Po
devi
alilin
urĝe
por
Skri
Pral

L
2-3
Prez
Hal
bon
mov
de
Min
D
grav
D-ro
kaj
L
ana
prol
opt

L
60,
esta
Kv
de p
Ins
mil
ver
esp
Pri
S
lon,
sen
par
mir
urb
vid
Pre
par
par
sub
S-ro
esta
L
scie
Ega

kursaroj en Karlovy Vary kaj Rožnov. Se oni kalkulas la ĉeestantojn en pluraj regionaj konferencoj Esperantistaj en la somera sezono oni ricevas la sumon de preskaŭ 2,000 partoprenintoj! Impona cifero por negranda lando.

Post kvin jaroj de radio-elsendo la ĉeĥaj stacioj devis ĉesigi programojn en Esperanto (ankaŭ alilingvaj programoj ĉesis). Estas dezirinde kaj urĝe, ke miloj da samideanoj skribu senprokraste por peti daŭrigon de la Esperantaj elsendoj. Skribu al Ĉeĥoslovaka Radio, Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.

Islando

La unua Islanda Esperanto-Kongreso okazis 2-3 sept. 1950 en la Universitato Reykjavik. La Prezidanto de la Islanda Federacio S-ro pastro Halldor Kolbeins, malfermis la kongreson kaj bonvenigis aparte la unuan pioniron de la islanda movado D-ron Thorsteinn Thorsteinsson, direktoro de la Statistika Oficejo de Islando. Diversaj Ministroj kaj altaj instancoj salutis la kongreson.

Dum la raportado pri la movado oni emfazis la gravan kontribuon de eksterlandaj prelegantoj: D-ro Mildwurf kaj S-ro Russell Scott el Anglujo kaj D-ro Lapenna—ĉiuj membroj de U.E.A.

La kongreso plejparte dediĉis siajn fortojn al analizado de la organizaj kaj propagandaj problemoj, kaj evidentis el la diskutoj spirito de optimismo pri la estonteco.

Japanujo

La Ministerio por Eduko asignis la sumon de 60,000 jenoj al studantoj de esperantologio. Tio estas el la tuta sumo de 36 milionoj jenoj (do 6%). Kvin petskriboj por la subvencio estis prezentitaj de privataj esplorantoj pere de Japana Esperanto-Instituto kaj la jenaj tri sinjoroj ricevis po 20 mil jenoj: Kenji Ossaka—Studo pri la formo de verboj; Mijake Ŝihej—Pri la limo de la ebleco de esprimoj en artefarita lingvo; Cunetaro Fujima—Pri la ideo de internacia lingvo en Japanujo.

S-ro Yukio Ozaki, 92-jara deputito (eble la plej longedaŭra parlamentano en la mondo—deputito seninterrompe de la jaro 1892 kiam la japana parlamento estis instalita por la unua fojo), iama ministro por edukado, kaj por justeco, iama urbestro de Tokio, vizitis Usonon en majo. Li vidis multajn eminentajn usonanojn inkluzive de Prezidanto Truman, kaj laŭ gazetraportoj ofte parolis pri internacia lingvo. Estas certe, ke li parolis pri Esperanto ĉar li estas tre fervora subtenanto de nia afero. Lin akompanis lia filo S-ro Yukiteru Ozaki, senatano. Senatano Ozaki estas Esperantisto de 20 jaroj.

La 23-an majon kunsidis en la domo de JEI 16 sciencistoj okaze de vizito al Tokio de D-ro F. Egami, profesoro de Nagoya Universitato kaj

D-ro T. Kuwahara, inĝeniero de Industria Eksperimentejo en Osaka de la Ministerio por Komerco kaj Industrio. Sekvo de ĉi tiu kunsido estas, ke oni decidis eldoni Esperantan medicinan revuon (sezona eldono) kaj kompili sciencan terminaron. La unua numero de la medicina revuo aperos en somero.

La librejo Iwanami, Tokio, la plej bonfama eldonejo en Japanujo eldonis en majo biografion *Zamenhof, la patro de Esperanto* de Saburo Ito kiel la 30-an kajeron en la postmilita serio de *Iwanami Novaj Libroj*. La biografio ampleksas 240 paĝojn en formato 10.5 x 17.5.

Portugalujo

Informo ricevita: "Mi ne volas supozigi, ke la Portugala Registaro nuligos per dekreto la malpermeson (kontraŭ Esperanto); sed mi konstatas, ke la cenzuro, kiu estas speco de registara barometro, ja konsentas la aperon de noticoj, kelkaj el ili gravaj, pri la neŭtrala kaj katolika sekcioj. Ĉar tio okazis jam post la ŝanĝo de la Ministro de la Internaj Aferoj mi volas konkludi, ke la propagando de Esperanto estas nun permesata". Ni ĝoje salutis tiun heliĝon de malagrabla kaj netolerebla situacio.

JEN LA LIBRO

por vi:

Faktoj pri Danlando

Prezo 3 ŝil., afranko 2p.

64 paĝoj, multaj ilustraĵoj, belaspekta, presita sur bonkvalita papero kaj plenplena de Faktoj pri Danlando.



Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe

Libroservo de C.D.E.L.,

Hørmarksalle 5, Risskov, Danlando

Thorsten Odhe :

LA KONSUMKOOPERADO EN SVEDLANDO



Luma, entrepreno por elektraj lampoj

La unuaj konsumkooperaj societoj en Skandinavio estiĝis en Danujo. Proksimume samtempe oni fondis tiajn en Norvegujo, poste venis Svedujo, kaj ankoraŭ iom poste Finnlando. Nuntempe la konsumkooperado estas tre disvastigita en ĉiuj skandinaviaj landoj inkluzive Islandon kaj estas forta demokrata elemento en la produkta vivo de tiuj landoj. La origina celo de la kooperaj societoj estis, en Svedujo kiel en ĉiuj aliaj skandinaviaj landoj, ebligi al la membroj aĉeti avantaĝe, kaj en la sveda kooperado oni ankaŭ nun unualoke dediĉas sin al la detalkomerco.

Mallonga resumo pri la historia evoluo kaj la labormetodoj de la sveda konsumkooperado povas esti interesa.

Konsumkooperaj entreprenoj komencis estiĝi en la mezo de la jardeko post 1860. La unua konsumorganizo estis fondata jam 1851—kompreneble oni tie ĉi havis neniom da scio pri la tiamaj konsumkooperaj movadoj en aliaj landoj. La fondantoj kaj membroj de tiuj unuaj konsumsocietoj estis ekskluzive bienuloj kaj homoj el la meza klaso. En la okdekaj jaroj estiĝis t.n. *laboristaj rondoj* en la liberal-ideologie influita parto de la laborista klaso, kaj la tasko de tiuj estis havigi rabatojn al siaj membroj. Je la mezo de la okdekaj jaroj ekzistis pli ol 100 tiaj rondoj. La plej multaj el tiuj societoj komencis tamen mem aĉeti kaj vendi varojn. Iuj el tiuj laboristaj rondoj ekzistas ankoraŭ en formo de konsumkooperaj societoj. En la fino de la okdekaj jaroj la nombro de la

konsumsocietoj estis ĉ. 400.

Pli forta la movado fariĝis nur post kreo de centra organizo je la *Generala sveda koopera kongreso* kiu okazis en Stockholm la 4/6-an de sept. 1899. Pli ol kvardek konsumsocietoj reprezentitaj en tiu kongreso fondis la duan tagon la svedan *Kooperan Federacion*, Kooperativa Förbundet (KF), kiu origine estis konsumsocieta unuiĝo por la propagando, sed kiu poste fariĝis ankaŭ ilia komuna grandkomerca entrepreno.

Dum la paso de la jaroj fariĝis por la konsumsocietoj grava celo atingi malaltan gajnorepagon kaj responde malaltajn varprezojn. Tiamaniere ili povis raciigi sian varperadon, kaj ilia sortimento laŭpaŝe ampleksis pli kaj pli da varspecoj. Dank' al tio ke la konsumsocietoj sekvis la principon de kontanta pago kaj je aĉetado kaj je vendado, ili ricevis firman grundon sur kiu ili povas konstrui.

La svedaj konsumsocietoj havis 1948 sume 905,000 membrojn. Ĉar unu familion reprezentas ordinare nur unu membro, tiu cifero respondas al unu triono de la sveda popolo, se ni supozas, ke ĉiu familio konsistas el kvar personoj. En 1948 troviĝis en Svedujo ĉ. 7,500 butikoj kun suma spezo de proks. 1,400 milionoj da kr. Kontraŭe al la organizoj en multaj aliaj landoj la svedaj konsumsocietoj ĉiam estis severe neŭtralaj en politiko kaj religio. Dank' al tiu sinteno la konsumkooperado gajnis membrojn en ĉiuj profesioj kaj sociklasoj.



Loĝejoj por dungitoj sur koopera insulo Kvarnholmen apud Stockholm

Ĉirkaŭ 16% de la tuta membraro konsistas el terkulturistoj—plejparte memstaraj. Tio respondas al proks. 145,000 familioj. Pli ol 8% apartenas al la metioj, 26% estas industrilaboristoj kaj 16% aliaj laboristoj. Pli ol 12% estas oficistoj kaj dungitoj, kaj 1.6% reprezentas la liberajn profesiojn (kuracistoj, ĵurnalistoj, verkistoj k.t.p.)

Ĉar 145,000 membroj apartenas al la terkulturistoj, troviĝas kompreneble granda nombro da konsumsocioj en la kamparo. En aliaj okazoj la terkulturistoj estas membroj de konsumsocioj en urboj aŭ aliaj grandaj lokoj. Kun kelkaj malmultaj esceptoj la kunlaboro en la svedaj konsumsocioj inter la diversaj sociklasoj estis ĉiam la plej bona. Kiel jam dirite, tio dependas de severa politika kaj religia neŭtraleco. En preskaŭ neniu alia lando oni tiom kiom en Svedujo atentis, ke la movado estas de ekonomia naturo. Ĉiujn provojn utiligi ĝin por aliaj celoj oni senescepte malhelpis.

De longe la nombro de konsumsocioj ne plu kreskis sed kontraŭe malaltiĝis. En la komenco de 1948 ekzistis 676 socioj kontraŭ 922 en 1921, kiam la nombro estis plej alta. La nombro de kooperaj butikoj tamen altiĝis inter 1921 kaj 1948 de 1669 ĝis 7492. Rilate al kapitalo la konsumsocioj financas sian agadon ĉefe per propraj rimedoj. En la fino de 1948 la akcia kapitalo kaj la rezervfondo estis sume 268 milionoj da kr. Tio signifas, ke la sveda konsumkoopero estas tute sendependa de fremda kapitalo, ekonomia ŝtata subteno kaj privatkapitalistaj pruntedonoj. Nur en tia maniero ili povis plenumi sian taskon zorgi por la intereso de la konsumantoj—kaj *ni* de tiuj.

La konsumsocioj en Svedujo vendas ĉefe nutraĵojn (spicaĵojn, viandon, panon kaj lakton, legomojn, fruktojn) sed krome ankaŭ mastrumilojn, vestojn, laborilojn, kaj varojn por la terkulturado, ekz. sterkon kaj furaĝo-varojn. La suma spezo en 1948 estis 1,428 milionoj da kr., kio kredeble respondas al ĉ. 20% de la tuta detalkomercio per nutraĵoj. Multaj konsumsocioj havas proprajn, lokajn produktad-entreprenojn, antaŭ ĉio bakejojn kaj viandfabrikojn, bierfarejojn kaj fabrikojn por refreŝigaj trinkaĵoj, ŝuriparejojn. Kelkaj socioj en la kamparo por siaj membroj tamen ankaŭ vendas terkulturajn produktojn, ekz. grenon, viandon, buteron kaj fromaĝon.

En 1948 la industri-entreprenoj de *Kooperativa Federacio* produktis varojn por 419 milionoj da kr., kio do respondas al pli ol duono de la suma spezo de la Federacio.

La tuta konstruo de la sveda konsumkoopero estas esprimo de ekonomia demokratio. Tial la

movado dediĉis specialan atenton al kleriga kaj informa agado. La membroj ĝenerale same kiel la funkciuloj elektitaj de ili kaj la dungitoj devas havi bonan scion pri kooperado por povi kontentige plenumi siajn taskojn. La praktika kaj teoria klerigo de la elektitaj funkciuloj okazas pere de centra koopera korespondlernejo, *Brevskolan* (La Leterlernejo), kaj per vasta reto da studrondoj, kooperaj grupoj, virinaj gildoj kaj aliaj organizformoj.

Dum sia evoluo en diversaj kampoj la sveda konsumkoopero movado gajnis la rekonon, ke ĝi estas krea elemento, kiu laboras por progreso kaj stabiligo en la sveda produktadvivo. Ĝiaj rimarkindaj agoj kontraŭ regulita produktadvivo kaj aliaj formoj de ekonomia sklaveco lokis ĝin en la unuan vicon de la batalantoj por libero. Kiel tia la movado en niaj tagoj ĝuas altan respekton de la sveda popolo; kaj kiam ĝi faras paŝon por defendi la rajton al libero kaj progreso en la produktadvivo, ĝi tial povas kalkuli pri subteno de multe pli vastaj rondoj ol sole tiuj de la propraj membroj.

(Ekstrakte represita kun la afabla permeso de Kooperativa Förbundet el ties broŝuro *La konsumkoopero kaj la ekonomia vivo de Svedujo*. Ni deziras esprimi al KF nian dankon pro tiu permeso kaj pro la fototipioj pruntitaj.)



Goethe :

Mignon

La landon, kie citronujoj floras
kaj oranĝujoj, ĉu vi ĝin memoras ?
De la ĉielo blua milde ventas,
la laŭro staras kaj la mirt' silentas.
Ĉu vi ĝin konas ? Tien mi
volonte irus kun amato, vi.

La domon kun la front' en greka stilo,
la salonegon en tut-ora brilo
Ŝtonbildoj eĉ rigardas min kompate :
"De kiu vi malĝojas afiktate ?"
Ĉu vi ĝin konas ? Tien mi
forirus kun ŝirmanto mia, vi.

La monton kaj ponteton en nebulo
—tra nuboj serĉas vojon nia mulo ;
en grotoj loĝas praa drakidar',
falegas akvo super ŝtonegar'—
Jes, vi ĝin konas ! Tien ĉi,
ho mia patro, kune migru ni !

Esperantigis Otto Bonte.

LA POEZIA KONKURSO ĈE LA 35a KONGRESO, 1950

Tiu ĉi konkurso estis bona surprizo, ĉar ĝi montris sin altnivela. La ricevitaj pecoj (krom unu, kies aŭtoro laŭ persona teorio forigis la akuzativon—sed ni havis por juĝi nur la esperantlingvajn verkojn) entenis neniujn gramatikajn erarojn aŭ mallertaĵojn kaj estis redaktitaj en facila, agrabla stilo. La tasko de la juĝantaro estis do malfacila, des pli ke difekta regularo ne lasis al ĝi sufiĉe da tempo por trankvile esplori la poemojn. Ni tamen provis esti justaj. Ni atentis principe la originalecon de la formo kaj de la temo, la elvokivecon de la bildoj kaj la influovon de la ritmo.

Kronante la "Kanto de la Ĝojo", la juĝantaro volis, laŭ mia supozo, rekompenci la profundan sinceron de la poeto, la heroecon de lia morala inspiro kaj ankaŭ la ardan patoson de lia deklamado. Estu tamen al mi permesite riproĉi milde la poeton, ke li enkondukis prozodiajn apartaĵojn de la itala lingvo: en la nia, oni ne rajtas kalkuli kiel unu silabon du apudajn vokalojn. Ekz-e "ĉiaman" (v. 4) estas ne trokeo, sed ja amfibrako trisilaba; same (ar) "meo de spi" (ritoj) (v. 7) havas unu silabon troan por konsistigi daktilon. Cetere, mi plene dividus la opinion de Kalocsay, ke tiel longa verso, kia la heksametro, necesigas viran cezuron: se oni ĝin ne uzas, oni ricevas tedan serion de amfibrakoj, kiuj havas

nenion komunan kun la daktila ritmo (vidu ekz-e la v. 3, 11, 25—la aliaj evitas tion nur dank' al la malĝusta prozodio).

La "Songinfano" frapas antaŭ ĉio per la originaleco de la temo kaj per la intimeco de la sento; sed ankaŭ la formo respondas al tiuj meritoj per la riĉo de la aliteracioj kaj per la neatendita, belefeka svingo de la lasta plilonga verso (kun ĝusta vira cezuro!).

La soneto "Li" evidentigas imagoforton de vera poeto: la bildoj de la verstrioj neforgeseble desegnas la figuron de nia plej granda esperanta bardo. Kaj la denseco de la versoj, la varieco de la rimoj finas la ĉarman efekton. Estas bonaŭgure al ĉiuj literatur-amatoroj, ke nova skota skolo ŝajnas preta relevi la lumilon falintan—provizore, ni ĉiuj esperas—el la manoj de niaj Budapeŝtaj eminentuloj. Tion saman diris pli draste alia verko de sro Rossetti, unu balado, kiu tamen meritentis tro da neologismoj por rikolti la tutan merititan aprobon.

Ni povas konklude gratuli ĉiujn konkurintajn poetojn, ke ili donis okazon al tiu ĉi paca batalo, en kiu ne nur venki, sed jam partopreni estis vera honoro.

G. Waringhien,
Prezidanto de la juĝantaro.

En nia librolisto estas **50** libroj niaj nun akireblaj. Petu ĉe U.E.A senpagan libroliston: la libroj estas haveblaj ĉe preskaŭ ĉiu Esperanta librovendejo.

En Novembro aperos
Epoko-libro n-ro 10

KISO DE LA REGINO
(Aventuroj en Kongo Belga)

Najivin (trad. Staritsky)
Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.



En Decembro aperos
tute reviziita eldono, 317-paĝa, de
**NAŬLINGVA ETIMOLOGIA
LEKSIKONO**

Louis Bastien, L.K.
Prezo 12ŝ. 6p., afranko 6p.
Bele presita kaj bindita

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED
Mendu ĉe vialanda Esperanta librovendejo aŭ ĉe
Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Unua Premio : D-ro Vincenzo Musella.

La Kanto de la Ĝojo

“Laŭdata estu, mia Sinjoro,
pro mia korpa fratino Blindeco !”

I

Mi renaskiĝis, tiun ĉi matenon, en ĝoja deliro :
Jen, mi sentas la vivon, mi la junecon sentas.
Juna mi estas, kaj juna mi sentas, ke ĉiam mi restos :
Mia mi sentas la ĉiaman ĉionrenovigan forton.
Kaj mi min sentas soldato de tiu sankta armeo gloro plena,
Kiu kuraĝis leviĝi alten, survoje al ĉielo :
Sankta armeo de spiritoj puraj la ĉielon celantaj,
Kiu por flugi vivas, kiuj por triumfi mortas.

II

Mi vin salutas, juneco mia la doloron venkinta,
Vin kiu per ĉiu via larmo novan flugilon forĝis !
Mi vin salutas, okuloj senvide vidantaj la lumon :
Lumon de tiom da pensoj, lumon de tiom da revoj ;
Lumon de ploroj ŝirantaj, de egaj rezignoj, de tiom da
Karaj verkoj revitaj, kiuj neniam naskiĝos ;
Lumon de stelo mia, kun mi al senlimo fluganta
Sur la grandajn flugilojn de mia dolor' senlima.

III

Kaj, jen, vi la forto, vi de la vivo la vivo,
Vi plorado kaj ĝojo, vi ravega turmento,
Vi, Poezio, renaskiĝas. De viaj vibrantaj flugiloj,
Netoleraj, potencaj, flugon revantaj ĉiam,
Mi enabismiĝi min sentas en ĝoj-uraganon furiozan,
Kiu min renversas, kiu min transportas foren.
Nun mi surflugas miljarojn, kaj vivon alian mi travivas,
Kie estas ĉio pureco, kie estas ĉio klarvido.
Ĉion en mi mem mi spertis, mi venkis la mondodoloron :
Malfermegita okulo mia nun sur Dio fiksiĝas.

Duaj Premioj samrange : P-ro J. S. Dinwoodie kaj Mag. Reto Rossetti.

Sonĝinfano (J. S. Dinwoodie)

I

En la silento de l' noktmeza horo
Min vekis en la dorm' infankrieto :
Knabeto mia en amara ploro
Timis pri l' noktmallumo kaj kvieto :
Ĉar en la nokto, terurajkohorto
Kaŝe en ĉiu ĉambrangulo nigra
Minacas murde en kruelo tigra,
Kaj en la noktsilent' milfoje venas morto.
Vidante min, trankvilis la etulo
Kaj mian fingron li enmane prenis :
Teruro velkis for el la okulo,
Kaj pro sekuroseno dormo venis.
Okulojn la palpebroj forvualis,
Kiel petaloj de dormema floro ;
Kaj, kvazaŭ elĉizita el marmoro,
Serene la vizaĝ' en dormtrankvilo palis.
El mia kor' formortis la agito ;
Tenere fingron el manet' mi tiris,
Kaj turnis min al la soleca lito,
El kiu nur en sonĝo mi eliris.

Ĉar nur en sonĝovojo labirinta
Etulon kontraŭ noktdanĝer' mi gardis ;
Nur sonĝe la vizaĝon mi rigardis,
Vizaĝon de l' infan' neniam ekzistinta . . .

II

Li (Reto Rossetti) Al K. Kalocsay

La ŝtonojn de la lingvo li masonas,
La pezajn blokojn metas konstruiste ;
En granda sol' laboras li persiste
Por munti verkojn, kiuj nin imponas.
Kaj dum li skulptas, brikas kaj betonas,
Ni, nanoj, levas nur ŝtonetojn distre
Kaj mozaikas en kontento. Kriste !
Homoj, por ni li tamen pasionas !
Do helpu ! Ne admiru en sereno,
Kiel li staras sola sur posteno
Kolose, kiel traarkanta ponto,
Aŭ kiel silueto Eĵfeltura :
Komprenu, ke tra tiu fram' ajura
Jam diafane brilas la Estonto !

ŝtĉpán Urban :

LA DUBINDA VENĜO

Post angulo de la strato, kie mi loĝas, troviĝas gazetvendejo. Tamen de kelka tempo mi jam ne povas tie aĉeti, kaj mi volas la aferon tuj klarigi, por ke vi komprenu, kial mi devas nepre eviti tiun danĝeran lokon. Mi toleras ĉion kaj ĉiun, sed aŭdu !

La komercisto havas siajn tiel nomatajn *ĉevaletojn*, diversajn kromokupojn. Li efektive ne amas diletin nur ordinare, sed li obstine elektas ĉiam la plej strangajn okupojn, kiujn oni povus elpensi. Vi do vidas, ke la afero jam pro tio komplikiĝas. Li tamen kutimas de tempo al tempo eĉ ŝanĝi siajn dilet-okupojn ĝuste en la momento, kiam li per ardaĵaj paroloj pri ili interesis kaj konvinkis la tutan sian ĉirkaŭlaron. Jes, tio ĉi estas la plej terura fakto el ĉiuj. Liaj pasioj endanĝerigas ĉiun, kiu kontaktiĝas kun li. Li scias agiti per la plej ruzaj manieroj, kaj konvinkas preskaŭ ĉiun sian konaton pri la ega utilo de iu de li hazarda elektita agado. La nekredantojn la komercisto persvadas tiel longe ĝis

Sed tuj kiam la lasta estas varbita, nia komercisto havigas al si novan dilet-okupon kaj samtempe tute forgesas la antaŭan ! Kun simila bruo li, antaŭ mirigitaj homoj proklamas kaj defendas novan konvinkon malgraŭ tio, ke ĝi malakordas kun lia hieraŭa kredo. Ĉi tiu malakordiĝo estas en la tuta afero la plej interesa parto kaj ĉiam ege amuzas min. La plej multaj homoj simple ne ŝatas ŝanĝi siajn kutimojn, kaj kiam ili konvinkiĝis, ke io—ekzemple kolektado de pingloj—estas la plej grava afero en la mondo, kiu kuraguŝ eltrumpeti antaŭ ili, ke ĉi-kolektado estas ridinda, dume kaptado de papilioj ekzaltas la animon ? Sed ĝuste tion kutimas fari nia komercisto !

Fariĝas pro tio interesaj disputoj, kiujn mi ŝatas ĉiuokaze aŭskulti, ridegante kaj frapante al mi la femurojn. Restante flanke, mi subtenadas jen nian komerciston, jen iun el la oponentoj, nur por plilongigi la disputon kaj mian agrablan amuzon. Sed la ideon mem mi neniam akceptas. Je tio mi ne alkiutimiĝos. Mi ja havas aliajn interesojn kaj li neniam sukcesos kapti min en sia reto !

Certe vi opinias, ke mi estas malica, mokema kaj ke mi emas kalumnii. Sed ne kedu . . . ! Tio ĉi estas nur klaĉo pri nia malrespondeca komercisto en la gazetvendejo ; mi mem konvinkiĝis — per tute sciencaj rimedoj, kompreneble—ke mia karaktero estas tute sed mi antaŭiras la aferojn, kaj cetere mia rakonto ekdeflankiĝas. Mi ja ne volas fieri pri mia karaktero, tute ne !

Do nia komercisto ĉiam post nova eltrovo trairas mallongan etapon dum kiu li iĝas malparolema kaj evidente enpensiĝas, kaj li kutimas ne respondi scivolemajn demandojn ; sed unu tagon li retrovas la konscion. La *Nova Epoko* komenciĝas—por mia amuzo kaj je la ekmirego de lia cetera ĉirkaŭlaro, atakata per nova bluf. Ĉiun tagon nia komercisto atendas la momenton, kiam lia vendejo estas plena de aĉetantoj kaj tuj komencas disvolvi novajn teoriojn. Dum ĉi tiuj momentoj neniu kliento kuraguŝ eĉ malfermeti la buŝon por demandi, ĉu tio aŭ tio estas ricevebla. Nia komercisto nun fariĝas profeto kaj neniel volas esti ia aĉa vendisto. La vizitantoj, starantaj antaŭ la vendotablo, rajtas nur aŭskulti. La profeto ĵetas novajn kaj ĉiam novajn argumentojn inter ilin, ne ĉesante ĝis kiam la lastaj estas varbitaj, aŭ pli ofte tute detruitaj kaj nekapablaj kontraŭstari eĉ per unu vorto. En tiu agado estas vere io sugestia kaj mistere alloga, sed samtempe ankaŭ provoka. Li, strangulo, estas kapabla konvinki lamulon, ke li povas atingi saltrekordon, kaj eĉ fiŝon, ke ĝi kapablus kanti ! Sed min . . . ? Ĉe mi li ĉiam fiaskas ! Neniam mi fariĝos lia viktimo ! Ĉiuj liaj penoj estos vanaj.

* * *

Antaŭ nelonge okazis denove la konata ŝanĝo kaj aperis nova *ĉevaleto*. Jam de antaŭ la vitropordo mi rimarkis en la vendejo aron da viroj kaj virinoj starantaj antaŭ la vendotablo, kiel kutime. Jen estas mia momento. Mi jam antaŭĝojis, atendante la konatan amuzon. Espereble troviĝos kontraŭulo ? ! Sed tio, kion mi aŭdis interne, superis ĉion. Kun malfermita buŝo staras la homoj, aŭskultante paroladon, riĉe akompanatan de mangestado. La komercisto jen paliĝas, jen kun brulanta vizaĝo disvolvas tie teoriojn, alpkante per sia malgrasa montrofingro en la aeron por emfazi argumenton, jen batante per pugnoj kontraŭ nevideblaj malamikoj.

“Ĉi tie vi vidas” daŭrigas la komercisto, “ke ni neniel povas eviti la sorton. Kiam Saturno atingas lokon de Jupitero en nia horoskopo”

Kiel, mi petas . . . ? ! Saturno . . . horoskopo . . . ĉu mi bone aŭdas ? Mi konsterniĝis. La plej nova *elfosaĵo* ! Kia fantazio ! Kia diabla . . . ! Ĝuste la *astrologion* li devis elrasti, stultulo, la longe jam kadavrigintan mezepokan pseŭdoscienccon, kiu kuŝis ĝis nun trankvile kaj prave en la tombejo de superstiĉoj. Ĉu estas eble ? Ĉu tio ĉi povas ankoraŭ nuntempe trompi iun ? Eble li, kiel kutime, eĉ gajnos kelkajn facilkredemajn animojn por ĉi tiu malsaĝaĵo

Kaj
tiu
unu
lian

K

mi

pape

ĉeest

renv

difi

unu

mina

kom

sin,

sorto

M

mi

jam

elfos

kaj

hom

tiaj

T

kom

kiu

ne

Kaj la sekvoj . . . ? Malhelpi, ke sukcesu ĉi tiu danĝera eksperimento, jen tio estas mia unua devo ! Hodiaŭ mi atentos kaj malebligos lian animkaptadon . . . !

Kaj nun nia komercisto—komprenu, ke tiam mi vizitadis lian vendejon tute regule—prenas paperetojn kun desegnitaj horoskopoj de kelkaj ĉeestantoj kaj kun nepriskribebla ruzeco, ja eĉ renverseco, interpretas al ili la plej terurajn difinojn de iliaj karakteroj kaj sortoj. Kun malfermegitaj okuloj la viktimoj timigite observas unu la alian kaj super ili staras la sorĉisto, kiel minacanta fatalo mem. Kun klinitaj kapoj la kompatinduloj aŭskultas kortuŝite kaj bedaŭras sin, kredante sin forpuŝitaj de la senkompata sorto

Mia propra koro tamen ne povis elteni tion kaj mi enmiksiĝis. “Kiel vi kuraĝas revoki fantomojn jam de longe neitajn ? Ĉu decas, ke klera homo elfosu ĉi-aĵojn ? Ĉu ne ekzistas libera homa volo kaj racia fundamento de homa estado ? Ĉu vi ne hontas . . . ? Mi neniam povus min okupi je tiaj superstiĉoj kaj malsaĝaĵoj . . . !”

Tiel kaj alimaniere mi provis konvinki la komerciston pri la sentaŭgeco de la astrologio, kiu ne meritas la atenton de moderna homo. Li ne koleris kiel kutime, sed ridetante prenis el

kartoteko mian freŝe pretigitan horoskopon, ĝuste la miaj naskiĝtago kaj horo ! “Jes, jes . . .” li diris, “kompreneble, nia kara amiko devas ĉiam fervore batali kontraŭ superstiĉoj, la modernulo ! Jen, rigardu lian Jupiteron ! Rigardu Merkuron ! Li ja estas nekredemulo, emas moki kaj intrigas kontraŭ ĉiuj . . . ! Krome, li kutimas malbenadi nekredanto. Koncize : obstina homo, malbona karaktero Jen rigardu !”

La komercisto, montrinte desegnaĵon de mia horoskopo, diris tion kun pikanta ironio kaj . . . preskaŭ ofendis min persone ! Do, miaj Jupitero, Merkuro kaj aliaj diabloj instigis nian komerciston kontraŭ mi ! Sendube ! Fulmotondro ! (tamen pardonu, mi tiam diris *karamba* ĉar mi tiam ne sciis similan esprimon en Esperanto).

La sekvantan tagon mi denove pripensis la aferon. Jupitero, Merkuro, nekredemo, emas moki, provokas senĉese . . . ! Do, io pravas, preskaŭ ! Sed atendu *kara amiko* atendu nur momenton, ha, ha, mi havas ideon . . . !

* * *

Mi sekrete aĉetis astrologiajn librojn, ĵurlingite la vendiston ne perfidi miajn intencojn al iu mia konato, kaj aĉetis krome bezonajn tabelojn por kalkulado de stelaj movoj kaj ĉion por ke mi *daŭrigo sur p. 148.*

Raymond Schwartz

Sub signo de gaja Muzo

DU LIBROJ :

LA STRANGA BUTIKO	127 paĝoj, 3 ŝil., afr. 4p.
LA ĜOJA PODIO	271 paĝoj, bind. 8 ŝil. 6p., afr. 6p. broŝ. 6 ŝil. 6p., afr. 6p.

DU KANZONOJ :

ĈIU—ĈIU	9p. afrankita
PARIZO, ĈIAM PARIZO	9p. afrankita

Eldonitaj de

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO, PARIZO

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando

aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO

Mason Stuttard :

Fluoj en nia Literaturo

Jam estas konata fenomeno, ke en la literaturo konserviĝas la tradicio kaj kulturo de popolo. La literaturo je difinitaj epokoj reliefigas la fluojn kaj tendencojn ĉe la kolektivo, kies esprimilo ĝi estas. Se do Esperanto efektive estas "vivanta lingvo de vivanta popolo", kiel niaj propagandistoj amas aserti, ĝia literaturo devas doni almenaŭ iujn indikojn pri la animo de tiu popolo.

Pripensu tamen konvinkas nin, ke ne ekzistas Esperanta "popolo" laŭ la akceptita difino de tiu vorto. Mankas al tiu homa aro la homogena devenanta de komuno de lukto—ĉu ekonomia, ĉu socia—de aspiro, de ĝojo, venko, malvenko, de sufero, mallonge de historia tradicio. Eĉ ne ĉiuj Esperantistoj plene akceptas la koncepton pri homaranismo (forlasinte la idealismon de la trofervoraj apostoloj kiuj fanatikis antaŭ generacio, multaj el niaj samlingvanoj nun stagnas en marĉo de "praktikaj aplikoj" forgesante la deklaron de la iniciatinto de nia afero, ke "kun tia Esperanto ni volas havi nenion komunan") kaj kiam oni faras la lastan analizon evidentas, ke la sole homogena faktoro inter ĉiuj Esperantistoj estas la komune uzata lingvo.

Sekve estas malfacile konstati en la Esperanta literaturo konstantojn, kiujn oni povus akcepti kiel pozitivajn trajtojn de ĝia "popolo".

En la literaturo post la dua mondmilito—konsistanta el proksimume 150 verkoj—ni tamen povas rimarki faktoron gravan. El tiu tuto proksimume 90% estas tradukoj! Ankoraŭ estas fakto, ke post pli ol duonjarcento da literatura klopodo, niaj verkaj talentoj priokupiĝas pri la kvazaŭa insisto antaŭ skeptika mondo pri la taŭgo de Esperanto kiel traduklingvo!

Dua faktoro ne ĉiam evidenta en la fine eldonita verko estas la kontrollaboroj de diversaj personoj ĉe la manuskripta stadio. En la pasintaj kvar jaroj mi havis okazon trarigardi dekduon da verkoj antaŭ eldono. Membroj de la Literatura Komitato de FLE—kiu parenteze akiris merititan reputacion pro siaj kontrolaj laboroj ĉe multaj aperintaj verkoj—certe volas konsenti kun mi, ke Esperanto devas esti unika en tio, ke ĝia literaturo plejparte estas la verko de amatoroj, kiuj eĉ ne posedas la lingvon.

Sajnas al mi, ke inter tiuj du faktoj ekzistas kongruo. La grandega proporcio de tradukoj kaj la nepra bezono kontroli la lingvan kvaliton de manuskriptoj miaopinie rezultas el unu simpla fakto—la diletanteco de la Esperantistoj rilate sian aferon.

Antaŭ la mondo niaj propagandistoj proklamas la fakton, ke Esperanto estas helplingvo okupanta duan rolon apud la naciaj lingvoj. La granda plimulto de Esperantistoj eĉ ne pensas pri alia rolo, kvankam iuj el ni havas tute alian koncepton en tiu rilato. Mi mem, ekzemple, opinias ke verŝajne estas prudente iom rezigni pri esprimo de mia firma kredo, ke Esperanto estas la estonta mondlingvo, por ne forŝoki la varbotojn. La konkludo tamen estas racia kaj logika. Se ni argumentas, ke la oficiala akcepto de nacia idioma rezultigus la iom-post-ioman forpuŝon de la ceteraj idiomoj—temas pri jarcenta evoluo, komprenoble—la samo validas pri Esperanto en oficiala rolo. La tendencoj interne de naciaj lingvoj, la malapero de dialektoj kaj diversaj varioj de lingvo sekve de centrigaj, normigaj influoj (kino, radio, gazetaro) apogas la hipotezon, ke finfine—eĉ se pro nura inerto—la homoj rezignos pri la dua (loka) idioma kaj uzos nur la mondlingvon.

La emfazo donita al la ideo de helpa, dua, lingvo klare montriĝas en nia literaturo. Ĝi, kvazaŭ nura eĉo de la ĉirkaŭaj literaturoj, reflektas la idean duarolecon ŝvebantantan en la spiritoj de la Esperantistoj. Eĉ—kaj iom surprize—ĉe la laboristendencaj eldonejoj, kies anoj laŭte proklamas rezignon pri naciaj ecoj, la proporcio de originaloj estas mizere eta, kaj iom modifas la trumpetatan pretendon pri "sennacieco".

Konvenas en numero festanta la "tagon de la libro" tuŝi ĉi tiajn tendencojn kaj konstatojn por orienti nin pri niaj propraj ecoj ofte neperceptataj. Tiaj analizoj eble kondukos iujn el niaj verkistoj sur la vojon al tiu feliĉa tempo, kiam ni ĝoje salutos la aperon de nova verko en Esperanto, ne sole ĉar ĝi estas verko, sed ĉar ĝi estas ankoraŭ unu voĉo esprimanta la animon de la nova mondkolektivo; kiam oni verkos en Esperanto ĉar oni **devas**; kiam oni tradukos el Esperanto anstataŭ en ĝin.



LASTMOMENTA AVIZO : Ni bedaŭras raporti pri grava malsano de nia prezidanto, S-ro E. Malmgren. Ĉiuj gesamideanoj certe kuniĝos kun ni je esprimo de espero, ke li baldaŭ resaniĝos. **Ne sendu leterojn al S-ro Malmgren!**

Dume bonvolu adresi oficialajn komunikojn por la prezidanto de U.E.A. al la vicprezidanto: D-ro P. Kempeneers, 19 Ave. Montjoie, Bruxelles-Uccle, Belgujo.

tre
danl
info
mul
V
aŭ s

Ĉi
S-ro
Esp
UN.
neni
Esp
kon
Edu
riga
vort

P
esta
nen
kaj
ling
en
skri
la p
dev
div
ĉar
pur
kiu
esp
abs
ges
en l
ald

N
spec
aldo
prak
Ĉu
sen
dev
pres



NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

Delegit-servo

Mi volas anonci mian eksigon el la ofico de Delegito ĉar la korespondantoj petas de mi aferojn neplenumebajn, aŭ kiam mi povas plenumi la peton, tre ofte ne donas signon de vivo; oni ne nur ne dankas, sed oni eĉ ne diras, ke oni ricevis la informojn liveritajn de mi, kiuj ofte okazigis multajn klopodojn.

Vi devus rekomendi al la petantoj de informoj, aŭ servoj, ke ili almenaŭ konfirmu ricevon.

P.M.

UNESCO

Ĉi tiu vorto aperas trifoje en la anonco pri S-ro Elvin, sur p. 84 de *Esperanto*. Se ĝi estas Esperanta vorto ĝi devas esti prononcata UNESTSO, kiu estas neoportuna kaj efektive nenies prononco. Mi tial proponas, ke U.E.A. en *Esperanto* kaj aliloke uzu UNESKO. Tio konsistas el la ĉefiteroj de Unuiĝintaj-Nacioj-Edukca-Socia-Kultura-Organizo kaj povas esti rigardata kiel Esperanta formo de internacia vorto.

B.L.

Pri majuskloj

post legado de la artikolo pri majusklado mi estas konvinkita ke majusklado estas tute nenecesa vi ŝajne forgesas ke lingvo estas sono kaj ke skribo ne estas lingvo sed unu formo de lingvo-reprezentado oni ne indikas majusklojn en la parolo do oni ne devas indiki ilin en la skribo same ĉar oni indikas interpunktadojn en la parolo nur per paŭzoj de diversaj daŭrecoj oni devas indiki ĝin en la skribo nur per spacoj de diversaj longecoj paragrafado ankaŭ nenecesas ĉar ĝi ne ekzistas en la parolo majusklado interpunktado kaj paragrafado estas mezepokajoj kiujn oni devas forĵeti el la moderna internacia esperanto vi malpravas kiam vi skribas ke absolute neblas enkonduki levon de la ŝultroj gestojn okulumadon voĉmalaltigon kaj similajn en la skribo oni povas enkonduki ilin per simpla aldono de klariganta frazo

sincere

richard sandberg usono

Nia samideano rajtas al sia opinio kaj ni volonte donas specimenon de lia proponata skriba uzo. Ĉu necesas aldoni, ke lia opinio kontraŭas la tutan fakan opinion kaj praktikon pri la efiko de presliteraro sur la okulojn? Ĉu oni krome povus imagi ion pli tedan ol tutan gazeton sen majusklo, sen paragrafo, sen interpunktado? Homo devas ja havi absolute nenian estetikan ŝaton por la presarto se li aprobas tian praktikon.—M.S.

A. PAOLET, San Vito al Tagliamento, Italujo

Vi povas ankoraŭ havigi al vi

la plej gravan verkon de la plej karakteriza itala verkisto nun vivanta

HISTORIO DE KRISTO

de Giovanni Papini

esperantigita de ★ laŭ deziresprimo de l'aŭtoro

"Ni kore gratulas la eldoninton por la impona eksteriĝo de la libro, la nekonalan tradukinton por la granda laboro, konsciencie kaj entuziasme farita, ankaŭ la verkiston por la verko mem."

Literatura Mondo.

Volumo de xxx-575 paĝoj

Broŝ. It. L. 600 aŭ 8ŝ. 6p.

Tolbind. It. L. 900 aŭ 12ŝ. 6p.

KORO

de EDMONDO DE AMICIS

Tradukita el la itala lingvo de ★

En la idiomo de Zamenhof ĝi signifas ĉiutempan ĉefverkon por la homaro en la lingvo de l homaro. Milionoj da homoj legis ĝin en centoj da tradukoj. La Esperantistoj ĝuas la privilegion konatigi kun ĝi per idiomo dank' al kies fleksebleco kaj belsoneco la traduko impresas kvazaŭ oni legus la originalon.

1,822,000 ekzempleroj venditaj nur en itala lingvo !

320 paĝoj—arta kovrilo.

Broŝ. It. L. 400 aŭ 6ŝ.

Tolbind. It. L. 700 aŭ 10ŝ.

RAKONTOJ POR GEKNABOJ

de Italo Toscani, trad. R. Castagnino

"Bela, pure Zamenhofs lingvo, sen neologismoj, eble lingvo el la Kabe'a epoko, klara kaj simpla."
Heroldo de Esperanto.

Facila legolibro dum la kursoj

Prezo L. 80 aŭ 1ŝ. 4p.

PREĜARETO

de P. M. Carolli

Tria eldono, ampleksigita

Prezo L. 100 aŭ 1ŝ. 6p.

Al la prezoj aldonu 20% por aŭfranko

(1 dolaro=L. 625)

Mendu ankaŭ ĉe U.E.A.

TRA LA LIBRARO

* = akireblaj ĉe U.E.A.



***Tra la ventego**: elektita verkaro de Hristo Smirnenski: trad. el bulgara orig. Assen Grigorov, Atanas Lakov k.a. Dua eldono de Bulgara Esperantista Kooperativo. 20 × 14.5cm. 80 p. broŝ.; prezo 3ŝ., afr. 3p.

Smirnenski mortis en 1923 havante 24 jarojn. Sub la tiama reĝimo liaj poemoj, ne permesate presiĝi, vivis parkerite en la buŝoj de sampartianoj. Unua eldono Esperantlingva tamen kaŝiris al preso en 1931 kvankam la *Enciklopedio de Esperanto* ne mencias ĝin.

Kelkaj el la poemoj montras rimarkemon (*La Malgranda Ŝtonisto* 44, kaj *Karbofosiso* 19) aŭ kompaton (*La Maljuna Muzikisto* 41). Kelkaj plue montras mediton: *La Stratvirino* 42, kiu jam perdinte la animon ne povas morti; kaj *Ni* 21, la kreantaj laboristoj. En *La Flava Gastino* 51 li priskribas la tuberkulozon pro kiu li estis tiam mortonto. Kelkaj el la poemoj povus esti de Zamenhof; sed la stelo de Smirnenski, kvankam kvinpinta 14/6, estas ruĝa 15/9, kaj li elokvente laŭdas Moskvon 15. Lia versaĵo pri la *Unua de Majo* similas la odojn iam menditajn al la poetoj de reĝoj; sed viglaj kaj sinceraj estas la laŭdo al *Karl Liebknecht* 63, kaj la vireca spito trans la barikadojn en *Johano* 58.

Ĉe la fino estas trafa *Fabelo* 77 pri kiel riĉiĝinto forgesas siajn plebajn amikojn kaj siajn idealojn.

Dubinda Venĝo (*daŭrigo*)

povu praktiki la astrologion ĝuste laŭ la reguloj. Jes, mi mokas volonte . . . malbenita afero . . . krome mi estas obstina . . . kaj iomete malica, sed laŭ la astrologio mi antaŭ ĉio ŝatas rekompencan . . . fulmotondrrro! Tamen mia signo estas la *Libra*. Vi repagos al mi tiun ofendon, kara amiko, ha, ha, mi pruvos, ke estas ci, kiu estas stultulo kaj kredas superstiĉojn kaj mi pruvos tion per la *astrologio*, karamba!!! Jes per la astrologio. Nur atendu ĝis kiam mi estos prikalkulinta cian horoskopon . . . iru al la diablo . . . jes horoskopon . . . poste mi tuj trovos ĉiujn viajn malbenitajn kvalitaĉojn . . . fulmotondrrro! . . . kaj fiambiciojn! . . . Mi scias, ke sendube via Merkuro troviĝas en tre malbona aspekto rilate Jupiteron . . . malbenite . . . kaj ankaŭ la ceteraj planedoj versimile ne valoras multe . . . Ni vidos kaj ekscios, ĉu la racio . . . kion mi diris . . . ? . . . aŭ la astrologio . . . ?

Iru al la diablo!!! . . . Ho ve! Ankaŭ mi mem jam estas kaptita! **Mi ja fariĝis astrologo!**

La lingvo estas klara kaj la tradukintoj de la poemoj ŝajnas intence eviti vortojn ne en la *Plena Vortaro*. Sed en la du prozaĵetoj troviĝas: *kurorto* 75/-1, *gluoz* 75/-13, *akulo* 76/-5, *viloz* 78//15 kaj *plebeo* (ofte). Dube estas ĉu la parkerantaj malriĉuloj ĉiuj konis *Pompeii* 32/-10, *Prometheus* 25/6 kaj 40/-7 kaj *Spartacus* (ofte). Interesaj esprimoj estas: *nepras* 14/-14, *aĉeteblas* 45/-2, *malproksimas* 75/11. Ne nur Smirnenski sed ĉiuj ni bezonas oftege prediki kontraŭ *oro* 21/8, *kiraso* oraj 23/-9, *la ora di'* 13/-12, *ĉio el or'* 24/-6, *oroskvama giganto* 49/-6, kaj la *Ora Bovid'* 50/2. Kial sesfoje la vorto *misprofeta* kaj kial ĉio ruĝa estas *rubena*?

La tradukintoj permesas al si la proksimumajn rimojn, kiajn en *Lingvo Stilo Formo* priskribas Kalocsay, kaj eĉ plu. Kelkfoje tio sukcesas, *salikoj-malamikaj* 17, *svingis-igis* 63, sed ne tiom sukcesas *batalad'-kavalkant'* 17, *urb'-adult'* 33, *ŝklava-pafo* 64, kaj tute ne *inspira-liber'* 70 kaj *brave-ter'* 70. Nek povas ili sin teni eĉ al siaj propraj rimskemoj sur paĝoj 13, 21, 47. La metriko de unuopaj poemoj varias pro nenia videbla kaŭzo en la poemoj komencitaj sur p. 32, 51, 68; kaj sur p. 11, 12, 35 troviĝas multaj versoj kun troa aŭ manka piedo. Elizio aperas ofte, ekz. *De l' kruela milito tra l' kant'* 14/8. Pro tio ni trovas oftajn rimojn virajn, kiel ankaŭ en la Bulgara lingvo.

George Rust.

La Nova Erao, de M. A. Teixeira de Freitas; eld. la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. 26 p. kartonita. Havebla kontraŭ 5 rpk. ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praca da República 54-12, Rio de Janeiro, Brazilo.

Ni Esperantistoj ŝuldas multon al Brazilo kie troviĝas la sola registaro kiu serioze akceptas Esperanton kaj klopodas pri ĝia universala uzo. Antaŭ nelonge venis el Brazilo ĉi tiu verko bone presita sur bela papero, kiun ĉiu serioza Esperantisto devus legi, egale pro la stilo, kiel pro la enhavo.

Je la 16-a de Junio 1948 D-ro M. A. Teixeira de Freitas, Prezidanto de la Brazila Societo de Statistiko de la Edukado kaj Publika Sano faris longan paroladon temantan pri *La Nova Erao—la Erao de la Tutmondeco—kaj Esperanto* kaj ni ĉi tie povas legi lian gravan kontribuon al la temo.

D-ro Teixeira de Freitas diskutas la kaosan staton de la nuna mondo malgraŭ la sopiroj de la homoj al internaciaj paco kaj amikeco, kiuj—li asertas—estas la natura atmosfero de homaj interrilatoj. Antaŭ ol ni povos atingi tiun staton ni sendube bezonos universalan lingvon.

Pri lingvo internacia li diras: "La arta lingvo devas posedi neniajn dismembrigajn faktorojn. Ĝi devas partopreni en la lingva meĥanismo,

apart
ĝi dev
kaj fa
ĉi tiujRes
de la
klara
postu*E
de W
prezo

Ĉi

la an

germ

sed l

Esper

facila

kiu v

bezor

trovi

la bo

valor

vojaĝ

espr

trakt

Kiom

subti

kons

tiel m

Ĉi

sed l

devu

—pa

*E

Eld.

prez

Je

Laŭ

La e

plej

pern

Disk

ĝis s

nom

akuz

frazo

prez

fakt

esta

la l

valo

M

prez

aparte al ĉiu el la familioj de la naturaj idiomoj, ĝi devas esti severe logika kaj samtempe simpla kaj facila." Li trovas, ke Esperanto plenumas ĉi tiujn kondiĉojn.

Resumo povas doni nenian ideon pri la beleco de la verko, kiu estas verkita en digna, lirika, klara prozo, kiu ĉie atingas la altan nivelon, kiun postulas la temo.

R. M. Dhonau.

***Esperanto in der Tasche** (Esperanto en la poŝo) de W. kaj H. Wingen, 23×12cm. 48 p. broŝ. prezo 3ŝil., afr. 2p.

Ĉi tiu konversacia libro german-esperanta, laŭ la antaŭparolo, celas ĉiujn, kvankam ĝi estas en germana lingvo. Plaĉi al ĉiuj estas malfacile, sed la komencanto kiu volas libere paroli kun Esperantistoj supozeble trovos nenium malfacilaĵon sole per la konversacia parto. Studanto, kiu volos fosi pli profunden en la lingvon, tamen bezonos ion malpli koncizan ol la gramatikon, kiu troviĝas en la unua parto de la libreto. Aliflanke, la bonege kompilita konversacia sekcio estas tre valora kaj utila por tiuj, kiuj volos memfide vojaĝi en Esperantujo. Tie la leganto trovos esprimojn por ĉiu bezono. Li trovos ne nur kiel trakti la necesajn aferojn de la ĉiutaga vivo (ekz. *Kiom da diskonto vi kalkulas?*) sed ankaŭ la subtilaĵojn de ĝentila interrilato, kiel esprimi konsenton, dubon, k.s. (ekz. *Mi ne kredis vin tiel maljuna*—diplomata frazo !)

Ĉi tiu verko celas precipe germanlingvanojn, sed kiu intencas partopreni la U.K. en München devus porti *Esperanto in der Tasche* in der Tasche—pardonon—en la poŝo.

S.T.

***Komplementoj de l' verbo** : Daniel Quarello. Eld. D. Quarello & Cie. 32 p. 19.5×14cm., broŝ. prezo 1ŝ. 3p., afr. 1p.

Jen la tria kajero de la verko *Lernu Esperanton*. Laŭ ĝenerala aranĝo ĝi similas la jam eldonitajn. La ekzempligaj frazoj, kelkaj el la *Ekzercaro*, estas plejparte modelaj, sed la verkinto denove permesas al si la entrudon de personaj gustoj. Diskuteblaj, ekzemple, estas : la elizio en prozo, ĝis sekvata de infinitivo, la prepozicio *cis*, landnomoj kun *-io* anstataŭ *-ujo*, *ĉe* sekvata de akuzativo, *animalo* anstataŭ *besto*, kaj la strangaj frazoj kun *po* sur p. 68. Pro la iom subjektiva prezentado la verko ne taŭgas al komencantoj, kaj fakte "verkistoj, tradukistoj kaj literaturamantoj" estas celataj. Al tiuj, kaj precipe al studentoj de la Esperanta sintakso, la libreto ne estas sen valoro.

C.D.A.C.

Malsato en riĉa rikolto recenzita en okt-a n-ro, prezo 2ŝ. afr.

NI REKOMENDAS AL VI

jenajn librojn eldonitajn ĉe
SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20



Plena Vortaro de Esperanto (3a eldono). 512 paĝoj, firma tolbindo, form. 14×20 cm. Prezo 28ŝ. 6p., afranko 9p.

Leteroj de L. L. Zamenhof (prezentitaj de prof. Waringhien). Vol I kaj II, po 386 paĝoj; tolbindoj kun orumita titolo por vol. 21ŝ. 6p., afranko 9p.

Leteroj de E. Lanti; interesaj originalaj kontribuoj de socia pensulo pri vivo kaj organizado. 280 paĝoj, 8ŝil., afr. 6p.

Roza Luksemburg, ŝia vivo kaj laboro, de H. Roland-Holst (trad. Wels), Bindita 236 paĝoj, 12ŝ. 6p., afr. 6p.

La nuna stato de l'evoluismo. J. Rostand (trad. Delacourt). Grava scienceca studo pri la viv-origino.

114 paĝoj, kartona 6ŝ., afr. 4p.
bindita 7ŝ., afr. 4p.

Skizo pri ekonomia geografio. Horrabin. 45 entekstaj kartoj. 134 paĝoj, 5ŝ. 6p., afr. 3p.

Skizo pri filozofio de la homa digno. Prof. Gille, trad. E. Lanti. 148 paĝoj, 5ŝ. 6p., afr. 3p.

Eld. Ziegler (monopolo por vendo ekster Germ. ĉe SAT)

Faŭsto I, de J. W. Goethe (trad. Bartelmes). 192 paĝoj, lukse bindita 15ŝ., afr. 6p.

Petu detalan katalogon !

Ĉi-supraj libroj estas haveblaj ankaŭ ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ESPERANTOLOGIO

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto. 26×17.5 cm. Vol. I., n-ro 1, 80 paĝoj. Prospekton de D-ro P. Neergaard, Gothasgade 158, Kopenhago—K, Danlando.

Ankoraŭ nova *logio*, ekkrias la leganto, resumante rapide la diversajn *logiojn* de *astro-*, *filo-*, *freno-* ĝis la tiom moda *ideo-*, pri kiu li aŭdis, aŭ eĉ okupiĝis. Se ni hodiaŭ parolas pri Esperantologio, tio estas pro la efektiva utilo de tiu ĉi entrepreno, iniciatita de D-ro Paul Neergaard en Kopenhago.

De la tempo, kiam la homo konsciiĝis pri sia homeco, t.e. en la momento, kiam li vidis la diferencon inter si kaj la aliaj vivantaĵoj, li serĉis estri la naturon. La tri ĉefaj eltrovoj de la homo estas la lingvo, la skribo kaj la ciferoj. La antikvaj homoj rigardis ĉi tiujn emanaĵojn de la homa spirito kiel donacon de Dio kaj multaj kutimoj nunaj memorigas tiun ĉi kredon. La homa lingvo estis io nepre ekster la povo de la homo kaj la rakonto de la Babela lingvo-konfuzo enhavas profundan penson: la diverseco de la homoj premias diversecon de la lingvoj. La idealo, reakirota kiel la paradizo, estas ke **unu homaro parolu unu lingvon**.

Se la antikvuloj okupiĝis pri la homa lingvo, tio okazis nur por reguligi ĝin, por esplori la formojn, la vortojn, do la gramatikon, sintakson, devenon de vortoj. Longe konserviĝis la kredo, ke la homa lingvo estas io dio-donacita, kvazaŭ netuŝebla. Pri la origino mem, la opinio iama estis, ke ĉiuj lingvoj devenis de la Hebrea, la lingvo biblia, ĝis la enciklopediistoj kaj raciistoj metis la senkompatan tranĉilon de la scienco ankaŭ al la lingvo. Lingvokomparo, etimologio, estas la du kolonoj de la naskiĝanta scienco pri la deveno de la lingvoj. De tiu ĉi nova branĉo de la homa sciado ja estis nur unu paŝo al la ideo de sinteza lingvo, kunmetaĵo de la elementoj de la ĉefaj idiomoj aŭ efektive artefarita kreaĵo. Multaj estas la sistemoj aperintaj ĝis nun, sed nur unu gajnis konsiderindan anaron kaj fariĝis efektive lingvo uzata regule, t.e. instruata, studata, pridiskutata kaj eĉ persekutata.

Esperanto estas hodiaŭ realaĵo, kiun neniu instanco komisiota pri la demando de internacia lingvo povus preteratenti. Esperanto posedas ĉiujn erojn de parolata idioma: uzantaron, literaturon, tradicion, regulajn manifestaciojn, ĉion, fakte krom tero aŭ lando. Pruvite estas, ke lingvo povas evolui eĉ sen teritorio, kiu en ia rilato estus nur balasto. Se ni diras, ke mankas nenio pli, tio tamen veriĝas nur nun, pro la kreo de organismo donanta al si kiel taskon la esploradon sciencon de la lingvo. Tion ĉi celas *Esperantologio* la scienco pri la lingvo internacia, kaj la titolo de la revuo, kies unua numero aperis

en aŭgusto 1949. Redaktas ĝin D-ro Neergaard, subtenata de aro da distingitaj Esperantistoj, kompetentaj pro iliaj laboroj sur lingva tereno.

Vasta estas la programo. De la fonetiko ĝis la kompara lingvistiko ĉiuj eroj de la lingvo estas esplorataj. La revuo, kiu konigas la laborojn, prezentigas bele (ĝi memorigas, pro la kovrilo viv-ruĝkolora, al *La Revuo*) kaj al la formo respondas la enhavo. Vilho Setälä, ekzemple, skribas pri *Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vortrezoro*, Waringhien pri *La akuzativo en Esperanto, el teoria kaj interlingvistika vidpunkto*, Régulo Pérez pri *Hispanidaj neologismoj en Esperanto*; enestas anglalingva artikolo de Olav Reiersøl kaj R. C. Marble *A comparison between word formation in Esperanto and English*, kaj fine Neergaard prezentas Bibliografion de Esperantologia literaturo. Estas la intenco akcepti ankaŭ nacilingvajn laboraĵojn pri la temo por interesi lingvistojn pri tiu ĉi lingva branĉo: Esperantologio.

Tiu ĉi meritas ĉian subtenon, kaj komprenante ĝian nepran gravecon, ni invitas niajn lingve interesitajn samideanojn, ne nur je platona admiro, sed je konkreta partopreno. Ni deziras al *Esperantologio* vastan legantaron konstantan.

H.J.

Grava noto: Pro tio, ke la eldonintoj de *Esperantologio* ne rajtigis U.E.A. akcepti mendojn, interesatoj nepre **ne sendu mendojn al U.E.A. aŭ al ĝiaj perantoj**.

Ricevitaj:

Karlovy Vary: faldprospekto ilustrita; eld. Propaganda Oficejo de Karlovy Vary en Ĉeĥoslovakujo.

Norda Brabanto: turisma revuo *VVV Nieuws uit Noord-Brabant* (Dommelstraat Eindhoven, Nederlando) enhavas regule artikolojn en Esp. pri vidindaĵoj tiulokaj.

Angers: ilustrita faldprospekto en Esperanto; eld. Syndicat d'initiatives, Angers, Maine, Francujo.

Verona: ilustrita gvidfolio 8-paĝa ĉe A. Paolet, San Vito al Tagliamento, Italujo.

SAS: nova prospekto de Scandinavian Airlines System havebla ĉe SAS, Store Kongensgade 29, Kopenhago -K, Danlando.

Komunismo kaj la Patrolando: Boris Zihrl. El slovena lingvo trad. Kozlevčar Jože. Havebla ĉe Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, Jugoslavujo. Prezo 1 rpk.

Endre

Bren

1
K
Leeu
Di
vort
(V.-l
aŭ n
1.
(c) e
2.
cifer
3.
atin
4.
regn
5.
apo
6.
spir
7.
(c) s
8.
(c) l
9.
asfa
10
kar

Endre Ady :

LA FLAVA FLAM'

*Ekflagris ĵen sub miaj revoj
La flava flam'. Mi konsumiĝas :
Submergu min en or-torenton,
Rifuĝon mi ĉi solan avidas.
Muzik' sovaĝa min pelegas.
Min frenezigas ; ortint-sono.
Jam ekmutigu ĉi muzikon
La sorĉa vergo, la orbastono.
Vesper' la dolĉa, surda, venu,
Sen flamo flagra, tono flatu ;
Mi volas dormi sur ora lito,
Inert-rigide, peza, sata.*

*Trad. el hungara
Ni Ko Lao*

Brendon Clark :

TRIA SONETO

Mi min trovas sur peceto de la tero
Kies nomon mia lando priignoras ;
Kaj la landon mem la mondo ne memoras.
—Siavice, de la kosmo nur polvo.
Kaj, kompare kun la jam antikva sfero,
Nur malmultajn jarojn ĉiu homo floras ;
Kaj je ĉiu tago, kiun li esploras,
La Diablo ekgrimacas pro espero.
Tamen, kvankam de la ĉirkaŭanta mondo
Kaj de l' universo mi ne multon vidis,
Kvankam sur la ŝaŭmo de la tempa ondo
Mia vivo jam plejparte forrapidis,
Tute sensignifa estas nun por mi
La tago, kiun mi pasigas for de vi.

KIO ESTAS VIA V.-K. ? (respondoj sur p. 157)

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo (V.-K.) estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. **Preteksto** : (a) ŝajna motivo, (b) antaŭparolo, (c) enigmo ?
2. **Ĉifro** : (a) sekreta skribsignaro, (b) nombro, (c) cifero ?
3. **Strebi** : (a) froteti, (b) gladi, (c) streĉi la fortojn por atingi ion ?
4. **Haladzo** : (a) trovaĵo, (b) malbonodora gaso, (c) araba regnestro ?
5. **Inklini** : (a) havi impulson al, (b) kurbigi, (c) sin apogi ?
6. **Medio** : (a) ĉirkaŭaĵo, (b) peranto inter homoj kaj spiritoj, (c) rimedo, helpilo ?
7. **Bedo** : (a) meblo sur kiu oni dormas, (b) petego, (c) strio de tero kun floroj (ekz. en ĝardeno) ?
8. **Periferio** : (a) konturo de cirklo, (b) popoldanco, (c) kolonaro ?
9. **Pavimo** : (a) kortbirdo, (b) strattego el ŝtonoj aŭ asfalto, (c) timego ?
10. **Etoso** : (a) nevidebla estaĵo, (b) ŝvelparolo, (c) karakteriza atmosfero ?

INVITO

AL

ĈIELO

de

JAMES D. SAYERS

La konata aŭtoro skribis utopian manuskripton, kiu kelkfoje forrabas la spiron de la leganto, kaj kiu tamen ĉiam pripensigas lin pri la problemoj ekskuontaj la homaron. Sensacia libro, kiu sendube trovos siajn tradukantojn por naciaj lingvoj.

205 paĝoj, blanka papero, duontole bindita, multkolora ŝirmkovrilo.

Prezo :

15 ŝilingoj, afranko 6 pencej.

Eldonita de

SIEGFRIED ZIEGLER ELDONEJO

(ESPERANTO-FAKO),

München-Pasing, Germanujo.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

Anglujo.

T. L. C. Bluett :

TENDENCOJ ĈE POPOLNOMBROJ

RAPORTO DE REĜA KOMISIONO PRI POPOLNOMBRO EN BRITUJO

La reĝa komisiono pri popolnombro estis starigita en marto 1944. La prezidanto komence estis la lordo Simon kaj kiam li ekzigis en 1946 la kavaliro H. Henderson fariĝis la prezidanto. La komisiono konsistis el ankoraŭ 14 membroj, el kiuj 6 estis virinoj. La taskon de la komisiono oni difinis jene: ekzameni la faktojn pri la nuntempaj tendencoj rilate al la popolnombro en Grand-Britujo, esplori la kaŭzojn de tiuj tendencoj, kaj konsideri la demandojn, kiaj probable estos iliaj rezultoj, kaj kiajn rimedojn oni uzu (se oni uzos iajn) je la profito de la nacio por influi la estontajn tendencojn rilate al la popolnombro; kaj fari rekomendojn.

Krom la komisiono oni samtempe starigis tri komitatojn de spertuloj pri (1) la statistiko, (2) la ekonomio, (3) la biologio kaj la medicino, por konsili la komisionon pri tiuj fakoj. La komisiono ankaŭ konsultis spertulojn en aliaj landoj, ekzemple en Francujo kaj Svedlando.

La temo de la raporto koncernas ne nur Britujon, sed la tutan mondon, precipe la landojn de nord-okcidenta Eŭropo, kie sin montris similaj tendencoj. Oni observis en ĉiuj landoj tendencojn naski malpli grandajn familiojn ol antaŭe, precipe ĉe la plej prosperaj kaj plej bone edukitaj tavoloj de la socio, kaj multaj spertuloj kredas, ke tiu tendenco eble havos katastrofan efikon je la estonteco de nia civilizo.

* * *

Rilate al la popolnombro (48 milionoj) Britujo estas la 8-a inter la nacioj de la mondo. Ĉirkaŭ la jaro 1700 ĝia popolnombro estis nur 7 milionoj; ĝis tiam la proporcioj de naskiĝoj kaj de mortoj ambaŭ estis tre grandaj kaj preskaŭ egalaj; do la popolnombro kreskis nur malrapide, kaj kelkafoje eĉ malkreskis. (Ni ne havas precizan informon, sed oni kredas, ke tia ankoraŭ estas la aferstato en Ĉinujo). Unu el la kaŭzoj estis, ke la kuraca arto ne estis tiam multe progresinta, sed mi miras, ke la raporto diras, ke "hospitaloj apenaŭ ekzistis" ĉar oni scias, ke multaj el niaj hospitaloj estas tre antikvaj. Tamen en la komenco ili estis plejmulte nur loĝejoj por la plej malriĉaj malsanuloj; por tiuj, kiuj monpovis esti kuracataj en siaj propraj hejmoj, ofte ekzistis fortaj motivoj pro kiuj ili preferis tion. Sed en la 18-a jarcento komenciĝis —unue en Britujo kaj poste en aliaj Eŭropaj landoj—rimarkinda kresko de la popolnombro, kaj dum la 19-a jarcento la popolnombro rapide kreskis en ĉiuj Eŭropaj landoj krom Francujo, Hispanujo kaj Irlando. En Britujo ĝi kreskis

per 10% en ĉiu jardeko. Tion kaŭzis plibonigo de la sanitaraĵoj pro kiuj la proporcio de mortoj multe malpligrandiĝis. Tabela en la raporto montras la kreskon de la popolnombro en ĉiu kontinento dum la periodo inter 1750 kaj 1900. La popolnombro de la tuta mondo kreskis de 728 milionoj ĝis 1608 milionoj (t.e. per 121%). Nur en Afriko la kresko estis kompare malgranda (27%); en Azio la popolnombro duobliĝis, sed en Eŭropo ĝi kreskis de 140 milionoj ĝis 401 milionoj (t.e. per 186%). Elmigrintoj el Eŭropo provizis la tutan loĝantaron de Ameriko kaj Aŭstralio.

* * *

Dum la 19-a jarcento la popolnombro de Britujo fariĝis 3.5-oble pli granda ol en 1800. Tio ne estis la sola kaŭzo de ĝia granda influo dum tiu periodo, sed sen tiu kresko, ĝia influo ne estus tiel impona nek tiel daŭra. Dum la unua duono de la 20-a jarcento la pligrandiĝo de la popolnombro malkreskis de 25% ĝis 9%. Simila malakcelo troviĝas en ĉiuj landoj de nord-okcidenta Eŭropo krom Nederlando, kiel ankaŭ en malpli granda mezuro en Ameriko kaj Aŭstralio, sed ne en suda kaj orienta Eŭropo, Hindujo aŭ Japanujo. Ĝis la jaro 1931 multe pli multaj homoj elmigris el Britujo ol enmigris, sed post tiu date pli multaj enmigris. Malgraŭ tio tamen la malakcelo daŭras.

La ŝanĝo okazis, ĉar mezvalore la nombro de infanoj naskitaj rezulte de ĉiu edziĝo estas nuntempe nur 40% de la meza nombro dum la 19-a jarcento. Ĉirkaŭ la mezo de tiu periodo pro ĉiu edziĝo naskiĝis meze preskaŭ 6 gefiloj; Nuntempe la nombro estas nur 2.2. Por ke ĉiu generacio plene anstataŭu la generacion de siaj gepatroj estas necese, ke tiu nombro ne estu malpli ol difinita nombro—eble 2.5. Se dum longa periodo la nombro estas malpli granda, kvankam unue la popolnombro ankoraŭ kreskas, venas tempo, kiam ĝi komencas malkreski. Ne sufiĉas, ke la nombro de la nova generacio egalu la nombron de la malnova, ĉar el ĉiuj infanoj naskitaj, kelkaj mortas ne maturiĝinte, aŭ ne geedziĝas, kelkaj geedziĝintoj ne naskas infanojn, kaj kelkaj elmigras.

Antaŭe la plej ofta nombro de gefiloj en familio estis 5, 6 aŭ 7. Nun ĝi estas 1 aŭ 2. Antaŭe 16% de la geedzoj naskis meze 10 gefilojn aŭ pli; nuntempe malpli ol 1%. Do la nombro de naskiĝoj estas 10% ĝis 15% tro malgranda por anstataŭi la malnovan generacion, kaj ĉe la plej prosperaj klasoj per 40%.

Laŭ sendul familio kruda propo ne va komis ĉefa k temp prefer se la suficiu kiam tende neniu la ko Tio klasoj eduko malfa

Las ĝis n La k homo estigi antat komi tende de la noml

En de vi de y presi ateno

La rezul Usor estas apar pova kond de la estos fariĝ prop ĝeno La k ĝin. anko best purr hom

Laŭ la raporto la kaŭzo de tiu malkresko sendube estas, ke geedzoj volas limigi siajn familiojn. Antaŭe la metodoj por tio estis tre krudaj; en la komenco de la 19-a jarcento oni proponis pli bonajn metodojn, sed tiuj metodoj ne vaste koniĝis ĝis ĉirkaŭ 1877. Tamen la komisiono opinias, ke tiuj plibonigoj ne estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la familioj malkreskas de tiu tempo. Ĝi opinias, ke pro sociaj ŝanĝoj oni tiam preferis malgrandajn familiojn. Laŭ la komisiono, se la deziro ekzistus, la jam konataj rimedoj sufiĉus por ĝin efektivigi. La sociaj ŝanĝoj, eĉ kiam ili estas en si mem plibonigoj por ĉiuj, tendencas igi la kondiĉojn de geedzoj, kiuj havas neniujn aŭ malmultajn infanojn, pli dezirindaj ol la kondiĉojn de la gepatroj de grandaj familioj. Tio precipe evidentiĝas ĉe la plej prosperaj klasoj, se oni deziras por siaj gefiloj pli bonan edukon ol tiun, kiun la ŝtato provizas; la kosto malfavoras grandajn familiojn.

* * *

Lastatempe, de la fino de la dua mondmilito ĝis nun, la nombro de naskiĝoj denove kreskas. La kaŭzo estas, ke pli granda proporcio de la homoj geedziĝis en juna aĝo. Lastatempaj leĝoj estigis kondiĉojn pli favorajn por gepatroj ol antaŭe; ili jam ne tiom timas senlaboron; sed la komisiono dubas, ĉu okazis ia daŭra ŝanĝo je la tendencoj de la 20-a jarcento. La meza grandeco de la familio ankoraŭ ne ŝanĝiĝis, kaj la tuta nombro de naskiĝoj denove komencas malkreski.

En 1921 pro militoj kaj elmigrado la nombro de viroj estis je 13% malpli granda ol la nombro de virinoj, sed nuntempe la nombroj estas preskaŭ egalaj, kaj estontece (eble post 1962) oni atendas, ke estos pli multe da viroj.

* * *

Lastatempa esploro en Skotlando konfirmas la rezultojn de similaj esploroj en Anglujo kaj Usono—ke la plej inteligentaj geknaboj meze estas anoj de malpligrandaj familioj, eĉ kiam ili apartenas al la sama socia grado. Oni do ne povas klarigi tiun fakton per la efikoj de la hejmaj kondiĉoj. Ekzistas danĝero, ke la fina rezultato de la penoj plibonigi kaj plilongigi la edukadon, estos tio, ke la plej inteligentaj gelernejanoj fariĝos anoj de la plej prosperaj klasoj, ĉe kiuj la proporcio de naskiĝoj estas malplej granda, kaj la ĝenerala inteligenteco de la nacio malpliboniĝos. La komisiono mencias tiun aferon, sed ne diskutas ĝin. Ĝi diras nur, ke nenia tia malplibonigo ankoraŭ aperis. Mi atentigu, ke multaj praktikaj bestbredistoj estas tre skeptikaj pri la valoro de la purrasaj bestoj por la bredado, kaj la bredado de homoj estas multe pli malsimpla afero.

La komisiono rekomendas, ke la registaro iel provu konsentigi la plej inteligentajn homojn havi pli grandajn familiojn, sed ĝi ne sugestas iajn definitivajn rimedojn por tio.

Estas plej profite por la nacio, ke kiel eble plej granda proporcio estu produktantoj, t.e. kun aĝo inter 15 kaj 65 jaroj. Tamen inter la jaroj 1871 kaj 1947 la nombro de homoj, kies aĝo estis pli ol 65 kvarobliĝis! La proporcio kreskis de 4.8% ĝis 10.4%.

Jen konciza resumo de la konkludoj de la komisiono pri la probablaj tendencoj de la popolnombro dum la sekvontaj 30 jaroj:—

La tuta popolo kreskos, kvankam malrapide.

Aĝgrupo 15—65 (produktantoj) tute ne varios proporcie malkreskos.

„ 15—39 (nasko-kapabluloj) malkreskos (per 1,400,000 en 15 jaroj).

„ preter 65 — kreskos per almenaŭ 2,300,000, proporcie tre multe.

Inter aliaj proponoj la komisiono rekomendas:

1. pligrandigon de la ĉiusemajnaj subvencioj por infanoj post la unua, de 5 ŝilingoj ĝis 7 ŝil., aŭ preter la aĝo de 11 jaroj ĝis 10 ŝil.
2. kiel eble plej baldaŭan forigon de la escepto (pri la unua).
3. pliajn malŝarĝojn por gepatroj rilate al enspez-imposto.

Ĉiuj 14 anoj de la komisiono konsentis unuanime pri la raporto, sed S-ino M. C. Jay aldonis rezervan noton, en kiu ŝi faras aldonan rekomendon, ke ĉia edukado estu senpaga, kaj ke la enlaso en la plej bonajn lernejojn estu rezervata nur por la plej inteligentaj geknaboj, sed ne por tiuj, kies gepatroj povas pagi la grandegajn sumojn, kiujn oni nuntempe postulas.



Goethe:

Lied Klärchens (Egmont)

Goji,
malĝoji
pensema en kor';
pendi,
atendi
en ŝveba dolor';
gaji ĉielen,
mortadi pro tim':
sole feliĉa
amanta anim'.

Esperantigis Otto Bonte.

D. R. Collins :

Botelo da Parfumo

Kio enestas?

Oni ofte demandas, kiel oni faras parfumojn? La respondoj varias ĉar ili dependas de tio, kiom kostas la parfumo. Bonkvalita parfumo estas altkosta je produkto kaj tial altpreza je vendo. Eĉ kiam oni negocas pogranda—kiel mi—la kosto estas inter £300 kaj £500 por *gallon* (proks. 4 litroj). Feliĉe oni ne ĝenerale bezonas aĉeti parfumon tiukvante; fakte estas konsilinde ne, ĉar la rara fluido povus vaporigi aŭ malbonigi antaŭ ol oni povus ĝin uzi.

Ĉiuj parfumoj enhavas grandan kvanton da alkoholo, kiu funkcias kiel solvilo por la floraj kaj plantaj oleoj de kiuj venas la aromo. Bona parfumo enhavas de 70% ĝis 75% da alkoholo, sed malmultekosta povas enhavi ĝis 90% kaj sekve estas neforta kaj nedaŭra.

La plej necesaj ingrediencoj en la parfumo estas la floroleoj. Tiuj esencaj oleoj estas ekstraktoj el floroj de suda Francujo, Sicilio, Maroko, Kenjo, Aŭstralio kaj de iuj aliaj landoj, kie floroj estas abunde kultiveblaj je ekonomia kosto. La ĉefa angla floroleo—kiu parenteze estas multe pli bonkvalita, ol alilandaj similspecaj—estas lavendo. Tiun oleon oni uzas ne nur en *lavendakvo* sed ankaŭ en centoj da aliaj parfumoj. La ĉefaj floroleoj, sen kiuj la kreo de parfumoj estus neebla, estas jasmeno (de Francujo, Sicilio aŭ Egiptujo), rozo (de Bulgarujo aŭ Maroko), tuberozo kaj mimozo (de suda Francujo), geranio (de Madagaskaro) kaj orangfloro (de Alĝerio aŭ Egiptujo).

Kvankam floroleoj konsistigas la bazajn tonojn el kiuj la parfumisto komponas siajn harmoniojn, multaj aliaj plantoleoj faras sian kontribuon al la konsisto de parfumo: ekstraktoj el folioj, lignoj kaj arboŝelo, el fruktoj kaj gumoj. La oleoj de oranĝoj, limonoj kaj aliaj citronfruktoj estas uzataj en multaj modernaj parfumoj. Cedro kaj santalo estas necesegaj ingrediencoj por ĉiuj densaj parfumoj. Ankoraŭ unu grava oleo kun bonaj refreŝigaj kvalitoj (je etaj dozoj) estas ekstrakto el violfolioj.

Povas ŝajni strange, ke ne ĉiuj oleoj uzataj de la parfumisto mem bonodoras. Trifolio kaj mento, kiel ankaŭ pluraj gumoj kaj balzamoj, ofte estas tre naŭzaj laŭ siaj naturaj formoj kaj forto, sed eta aldono de tiuj al aliaj fortaj oleoj ebligas kreon de karaktero kaj originalo ĉe uzo de puraj floroleoj.

Krome ekzistas vasta provizo de aromaj krudaĵoj nomitaj *sintezaj*. Tiu termino tamen ne estas uzata kun signifo arte produktitaj por imiti naturajn oleojn. Neniu bona parfumisto

volas uzi artefaritajn surogatojn ĉar tiuj senescepte malsuperas la naturajn oleojn. Ofte tamen natura oleo enhavas multajn aromajn erojn, kiuj ne harmonias en la komponaĵo, kiun la artisto volas krei. La redistilado de natura oleo, aŭ ĝia diserigo en apartajn konsistigojn per kemia procedo povas rezultigi unu aŭ plurajn produkt-aĵojn kiuj estas ĝuste tio, kion la parfumisto bezonas por kompletigi sian formulon.

Unu el la plej gravaj ingrediencoj en parfumo estas la fiksilo. La fiksilo estas tio, kio donas al parfumo ĝiajn kvalitojn de konstanto kaj daŭro. Diversaj oleoj vaporigas je diversaj rapidoj. Se oni nenion farus pri tio je uzo de parfumo sur la haŭto la rezulto estus, ke unu post alia la konsistigaj oleoj vaporigus kaj la aromo senĉese ŝanĝigus. Moderna altkvalita parfumo povas enhavi ĝis 80 diversajn oleojn. Kun la vaporigo de nur unu aŭ kelkoj el tiuj oleoj la aromo, unue sorĉa kaj rava, povus fariĝi naŭza aŭ tute malplaĉa. Eĉ hodiaŭ oni ne tute komprenas la kvalitojn de fiksiloj. Oni scias nur—kaj tion oni scias de miloj da jaroj—ke iuj oleoj havas la proprecon egaligi la rapidon de vaporigo de esencaj oleoj kun kiuj ili estas miksitaj. La plej gravaj estas de bestoj: ambro de la baleno, cibeto de la abisena cibetkato, kaj mosko de la tibeta mosk cervo.

La parfumisto disponas pri multaj centoj da ingrediencoj, prezentantaj preskaŭ nekalkuleblajn variojn de kombino. La tasko krei parfumon estas peniga, malrapida kaj ofte ĉagrena. Dum la efektiva kombinado de provaj eroj, estas absolute neeble juĝi pri la rezulto aŭ eĉ pri la progreso de la eksperimento pro la ĉirkaŭa abundo de fortaj odoroj. Ĉiun provon oni testas malproksime de la laboratorio, kutime en la freŝa aero de la kamparo. Ofte okazas, ke parfumo, kiu je la momento de la kombino donas esperon, flarate en klara kaj freŝa atmosfero estas tute nebona. Mankas al ĝi karaktero, originalo. Tiam la eksperimentoj komenciĝas denove.

La kreo de parfumoj estas arto. Ĉiam oni strebas al la perfekte, kaj nur kelkfoje en tuta vivlongo la parfumisto sukcesas atingi iomon de tio, kion li celas, ĉar la kreo de eĉ unuopa parfumo povas okupi jarojn da laboro.

(Libere tradukita de M. Otiel laŭ informoj donitaj de S-ro D. R. Collins de GOYA, 161 New Bond St., London, al kiu ni esprimas nian dankon pro la afabla permeso uzi la materialon).

Kura
pri ebl
(22a) ENeka
povas
InformLuan
Figueir
diversaU.P.
sia lan
valorot
aerajn
skr. poDezi
John
Usono.200
pk., ku
grupo,
JapanuMez
tutmo
skulpt
istoj k
VonĉirFila
Poŝt-U
kompl
Hertz,Glu
tutmo
KongePlu
k.s. t
CollegLet
Pacon
Leter
Adres
NederEfil
Infor
(70), IJea
SkotlaAu
volasMi
rakon
gepat
multe
volon
7, Zei

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kuracisto sesdekjara deziras diskuton kun gesamideanoj pri ebleco fariĝi centjaraĝa. D-ro Wegener, Hollestr. 1, (22a) Essen, Germanujo.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Luanda, Angola, Okcidenta Portugala Afriko. Alfredo Figueira, Caixa Postal 1260, deziras korespondi pri diversaj aferoj kun tutmondaj gesamideanoj.

U.P.U. Filatelistoj! Sendinte al mi U.P.U. seriojn de sia lando, mi sendas kontraŭ la sama kvanto la saman valoron de la mia. Mi kolektas ankaŭ ruĝkrucajn kaj aerajn pm., sed precipe U.P.U. L. Kusmider, Pabianice, skr. poczt. 84, Pollando.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj John A. Umurs, 1138 N. Leavitt St., Chicago 22, Ill., Usono.

200 gejapanoj deziras kor. kaj interŝanĝi il. gaz., pm., pk., kun ĉiuj landoj. Skribu al Esperantista koresponda grupo, Oka-Shinmachi 260, Hirakata City, Osaka, Japanujo.

Mezaĝa oficistino deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde nur pri teatro kaj filmproblemoj, literaturo, skulpto, kaj pentroarto. Respondo garantiata. Filatelistoj kaj poŝtkartkolektantoj nedezirataj. Marija Babić, Vončinina 7, Zagreb II, Jugoslavujo.

Filatelistoj ekstereŭropaj! Sendu vialandan Unrv. Poŝt-Unian eldonon kontraŭ skandinaviaj pm. Nur kompletaj kaj neuzitaj serioj havas intereson. Olga Hertz, Hollandsvej 15, Kongens Lyngby, Danlando.

Glumarkoj. Interŝanĝas esperantistajn glumarkojn tutmondajn kontraŭ danaj. Olga Hertz, Hollandsvej 15, Kongens Lyngby, Danlando.

Pluraj gekursanoj diversagaĝaj volas interŝanĝi poŝtkartojn k.s. tutmonde. Esperanto Evening Class, Goldsmiths' College, New Cross, London, S.E.14, Anglujo.

Letervespero. La Haarlema Grupo "Komprenado faras Pacon" organizos en la mezo de Januaro 1951 letervesperon. Leteroj el ĉiuj partoj de la mondo estos tre bonvenaj. Adreso: F-ino E. Blokker, Bronsteeweg 26, Heemstede, Nederlando.

Efika okupeblo por E-aktivuloj kaj E-grupoj! Informilon sendos: Interlingvo ESPERANTO, Mulhouse (70), Francujo.

Jeanne Dick, 11 Bank Street, Ferryhill, Aberdeen, Skotlando, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

Aurora Saraiva, Rua Itapura 319, São Paulo, Brazilo, volas korespondi kun geesperantistoj pri iu temo.

Mi estas ses-jara denaska Esperantisto. Mi tre ŝatas rakontojn. Ĉu vi povas havigi—aŭ rekomendi—al miaj gepatroj infanlegajon? Prefere fabelojn. Per tio vi multe helpas ilin en mia du-lingva edukado. Mia patro volonte iel rekompencos. Peter Schilperoord, Borneolaan 7, Zeist, Nederlando.

Rezulte de kunveno okazinta en la Pariza Kongreso naskigis Asocio de ĉarpentistaj kaj lignajistaj Esperantistoj. Sammetiistoj tutmondaj bonvolu skribi informpetante al S-ro Romain Chambaz, 44 rue du Haut-Pavé, Etampes (S. et O.), Francujo, aŭ S-ro Albert Moody, 37 Upper Tooting Road, London, S.W.17, Anglujo.

Karta Enciklopedio, La Bosketo, Whiteway, Stroud, Anglujo sendos 4 laste eldonitajn poŝtkartojn ilustritajn kontraŭ 4 bildkartoj pri popolaj iloj aŭ kamparanaj konstruaĵoj, mueliloj, k.t.p. (en malfermita koverto kun adreso de la sendanto) aŭ 2 respondkuponoj.

Komercaj reklamiloj ĉiuspecaj en Esperanto bezonataj por stando ĉe grandioza Industria Ekspozicio en 1951. Se postulte oni rekompencos laŭdezire. Esp. gazetoj bv. represi. Urugvaja Esperanto-Societo, Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo, Sud-Ameriko.

Sveda revulo dez. interŝanĝi il. pk. (se eble kolorigitajn, pm. bildflanke). Deziras speciale: naciajn kostumojn, bildojn de popolmoroj kaj vidindaĵojn. Ankaŭ amatorfotojn. S-ro Åke Bengtsson, Ö. Ansgatan 11, Mölndal, Svedujo.

Giorgio Tonzig, Prato Valle, Padova, Italujo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun bonaj filatelistoj ĉiula daj, precipe el Grekujo, Germanujo, Hungarujo, Hispanujo, Finnlando, Bulgarujo, Portugalujo, Usono.

Gösta Erikson, Bondegatan 21, Örebro, Svedujo deziras korespondi kaj interŝanĝi papiliojn kaj koloritajn art-reproduktaĵojn.

Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista, 1951. Sesajaro, sen interrompo! Enskribo (nur por katolikoj) de nomo, adreso, aĝo, telefonnumero, katolika agado, koresponddeziroj—kaj Adresaro—kostas nur du internaciajn respondkuponojn. Sendu antaŭ 15 Decembro. Aperos Januaro 1951. Lorcán OhUiginn, Bothar Glasárd 16, Dublin, Irlando. 1950a eldono (ankoraŭ havebla sampreze) kovris 30 landojn.

S-ro Abdel Malak Mihail, importisto-eksportisto de diversaj varoj—Egiptaj kaj Sudanaj—deziras ŝanĝi komercaĵojn kun eksterlandanoj. Skribu multnombre al P.K. 350, Cairo, Egiptujo.

Fraŭlino 17-jara deziras korespondi kun aziaj kaj sudamerikaj landoj. F-ino R. Evans, 54 Carpenter's Wood Drive, Chorleywood, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Intersteno-konkurso: mildigitaj kondiĉoj: tempolimo 28.2.1951: sufiĉas pk. simpla (Vidu *Esperanto*: julia).

Jurnalojn, en diversaj lingvoj, kaj ankaŭ poŝtkartojn librojn, malgrandaĵojn, deziras interŝanĝi S-ro Berghofer Mladen, Zagreb, Orlovac 7 (Ksaver), Jugoslavujo.

Kotizoj 1951!—Por evitigi al vi interrompon en la regula liverado de la gazeto, kaj por helpi la administradon en la Centra Oficejo, bonvolu pagi vian kotizon kiel eble plej baldaŭ. Antaŭdankon.

MÜNCHEN


Kio estas München? Certe vi jam scias, ke München estas la ĉefurbo de Bavarujo. Vi ebla ankaŭ trovas en ĝisdata enciklopedio, ke la loĝantaro nombras 850,000 animojn, kaj vi tute prave konkludas, ke granda ĉefurbo elmontras krom kelkaj specialaĵoj ankaŭ artajn konstruaĵojn, monumentojn kaj muzeojn. Vi verŝajne ankaŭ memoras, ke München suferis detruojn dum la milito pasinta.

Tamen se vi lastatempe ne estis gasto en tiu urbo vi ne povas imagi, kiel vigle la vivo trapulsas ĝin. Vi ne povas supozi, kiom da energio, vivamo kaj ĝojo stimulas la agadon de la civitanoj, altiritaj el Bavarujo, Germanujo, eĉ el la tutmondo, kaj kiom da domoj kaj entreprenoj nov- kaj re-konstruiĝis en la lastaj jaroj.

detruita dum la milito, ĝi estas rapide rekonstruata kaj jam nun denove plenumas sian taskon; 3. la preĝejo de la Teatinoj situas kiel la du aliaj konstruaĵoj en la mezo de la urbo. Ĝi estas fidela rekonstruo de *S. Maria della Valle* en Romo kaj per ĝi enkondukigis malfrua baroko en München.

Ankaŭ la rokoka epoko prezentigas inde en nia urbo. Mi nur citas la Johano-Nepomuk-preĝejon de la fratoj Asam en Sendlingena strato.

La nova parto, kiu donis al la urbo la famon de moderneco, troviĝas ekster la mezo. Ĝi estis ekkonstruata sub reĝo Ludoviko 1-a. Li donis al la malvasta malhela antikva urbo helan aspekton kun italaj trajtoj. Mi nur nomas la *Ludwigstrasse*, norde de la urbdomo. Ĝi



Germana Muzeo. Malferma kunsido okazos en la halo en la antaŭo

Ne nur en la lastaj jaroj! München ekzistas jam pli ol 700 jarojn. Ĉiu epoko kontribuis laŭ sia stilo al la aspekto de la urbo. Grandskale konserviĝis ĝia emblemo: la preĝejo de la Sinjorino (*Frauenkirche*) kies du turojn—altajn 99 m.—ornamas la por Bavarujo tipaj bulbformaj kupoloj. Ĉi tiu katedralo prezentigas kiel simpla gota konstruaĵo, impona pro la simpleco kaj giganteco. Ankaŭ profanaj konstruaĵoj respegulas la gotan epokon de München. Inter ili elstaras la malnova urbdomo kaj la Sendlingena pordego. Renesanco kaj baroko montriĝas ĉefe per tri historiaj atestantoj: 1. Reziĝejo, arego de unuopaj konstruaĵoj ĉirkaŭantaj ses kortojn. Ĝiaj iniciatantoj estis princoj de Bavarujo, kiuj pligrandigis kaj pliriĉigis la palacon dum tri jarcentoj; 2. Mikaelpreĝejo, giganta renesanca katedralo, kies mezuroj montras la potencon de la eklezio en urbo kaj lando. Kvankam multe

komenciĝas ĉe *Feldherrnhalle* imitaĵo de *Loggia dei Lanzi* en Firenze (Italujo) kaj etendiĝas per longo de 1170 m. kaj larĝo de 37 m. Palacoj, inter ili la Universitato, formas indajn flankojn. La Pordego de Venko evitas enuan karakteron. La posteulo de Ludoviko, Maksimiliano, kontribuis al sama gusto per la rektangula daŭrigo ĉe la suda fino, strato de Maksimiliano, longa 1100 m. larĝa 23 m. kaj simile enkadrita per grandaj palacoj.

Ne supozu, ke jam elĉerpigis la listo de la allogaj vidindaĵoj! En la vera centro leviĝas ĝis 85 m. la Nova Urbdomo en imita gota stilo kun ĉiutaga famkonata sonorilludo kaj kun rimarkinde bela interno kaj—ĝojige—kun ĉefurbestro, kiu pretas helpi al la preparoj de nia 36-a U.K. per ĉiuj siaj fortoj. En la mezo de la urbo disradias la *Angla Ĝardeno* ne nur pulmo de la urbo, sed ankaŭ preskaŭ senlima promenadejo por ĝia loĝantaro. Sur insulo de la rivero Izaro konstruiĝis la

mondli
belega
por la
krome
la mu
plej gr
je nia
pri la
Müncl
Aŭ p
grando

Ne
rimar
monu
invita
certaj
vivam
bierej
de la
instiga
region
kongr

Rila
refreŝ
ideo t
prezid
ĉefurb
ĉeesto
pruvit
aferon
unua
anton
La T
Aro
plivas
ekvivi
nova
terito
centro
kaj la
rigard

1. (e
efektiv
2. (e
3. (e
4. (e
5. (e
6. (e
7. (e
kreska
8. (e
9. (e
10. (e

mondkonata teknika muzeo *Germana Muzeo* kies belega kongreshalo malfermos siajn pordegojn por la Solena Malfermo de nia kongreso. Ĉu mi krome parolu pri la amaso da artmuzeoj kaj pri la multnombro da sciencaj institutoj, inter ili la plej granda universitato de Germanujo, kiu estos je nia dispono dum la kongreso? Ĉu mi parolu pri la pompaj kasteloj antaŭ la pordegoj de München, pri la Nimfenburga Kastelo ekzemple? Aŭ pri la nacia trinkaĵo, la biero, kaj ĝiaj grandegaj konsumejoj, kiaj *Hofbräuhaus*?

Ne estas loko por nura citado de la plej rimarkindaj allogaĵoj: *Bavario* la giganta monumento, kaj *Angelo de Paco* la elstara kolono invitas vin rigardi ĉion proprokule. Kaj estu certaj, ke ne ekzistas enuo en la urbo de arto kaj vivamo. Teatroj kaj muzeoj, ĝardenoj kaj bierejoj, pulsanta vivo sur la stratoj kaj gastamo de la loĝantaro garantias senzorgan restadon kaj instigajn travivaĵojn. La proksimeco de la Alpa regiono kun montoj kaj lagoj allogas al postkongresaj ekskursoj kaj al kompleta refreŝiĝo.

Rilate refreŝiĝon! Ĉu ne estas la plej bona refreŝiĝo esti en lando kaj urbo, kie nia Esperanto-ideo trovis eksterordinaran eĥon? La ministro-prezidanto de Bavarujo persone invitas vin, la ĉefurbestro aliĝis. Ĉiuj pretas agrablighi vian ĉeeston. Ne nur vortoj estas diritaj, faktoj jam pruvis, ke Bavarujo akcelas grandskale nian aferon. La Universitato de München estas la unua en Germanujo, kiu oficiale enkondukis Esperanton. Tie okazas regule diplomaj ekzamenoj. La Teknika Altlernejo enkondukis Esperanton. Aro da kursoj, oficialaj kaj privataj, celas plivastigi la konon de nia lingvo. En München ekvivis post la malhela periodo de malpermeso la nova organizo de nia movado sur germana teritorio. En München troviĝas ĝia laborema centro; la centro de la Germana Esperanto-Asocio kaj la Germana Esperanto-Instituto. Venu, ĉion rigardi! München atendas vin!

S.Z.

KIO ESTAS VIA V.-K.? (vidu p. 151)

Respondoj

1. (a) **Preteksto** estas ŝajna motivo celanta kaŝi la efektivon.
2. (a) **Ĉifro** estas sekreta skribsignaro.
3. (c) **Strebi** estas streĉi la fortojn por atingi ion.
4. (b) **Haladzo** estas malbonodora gaso.
5. (a) **Inklini** signifas havi impulson al.
6. (a) **Medio** estas ĉirkaŭaĵo en kiu oni vivas.
7. (c) **Bedo** estas strio de tero kun floroj kaj/aŭ aliaj kreskaĵoj.
8. (a) **Periferio** estas la konturo de cirklo.
9. (b) **Pavimo** estas strattego el ŝtonoj aŭ asfalto.
10. (c) **Etoso** estas karakteriza atmosfero.

**Kredu min, sinjorino!
Miru—Pensu—Ridu!**

Kion signifas tiuj ĉi imperativoj? Ili estas la titoloj de du novaj libroj el la eldonejo de *Heroldo de Esperanto* en Scheveningen, Nederlando.



Kredu min, sinjorino! estas originala romano, bonhumora kaj iom frivoleta, de Cezaro Rossetti. Enkondukajn vortojn por ĝi skribis nia fama Raymond Schwartz.

Amplekso ĉ. 260 paĝoj.

Kun portreto de la aŭtoro.



Miru—Pensu—Ridu! estas libro kun tre varia enhavo, verkita kaj kompilita de Paul Bennemann. Ĝin oni prave povas nomi "la plej interesa libro iam aperinta en Esperanto". Amplekso 240 paĝoj, sed kun enhavo de 350-paĝa libro.

Kun ilustraĵo kaj kun klarigaj figuroj en la teksto.

Ambaŭ libroj estas belaj volumoj, bone binditaj. Ili estos livereblaj en la unua duono de decembro. Okaze de la Librotago 1950 favora prezo por ambaŭ libroj po 4.80 guldenoj aŭ 1.50 dolaroj.

Ĉe UEA po 11 ŝilingoj, aŭfrankite.

ENIGMA KONKURSO N-ro 52

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Enigmo N-ro 112 : a - bri - ci - da - de - do - do - fes - ga - ga - gon - kar - ko - le - lo - lo - mo - ne - no - no - no - o - pa - pre - ri - sol - te - to - tur.

El la ĉi supraj silaboj faru 9 sepliterajn vortojn, kies signifoj estas : 1. militisto ; 2. luksa manĝo ; 3. floro ; 4. pasera birdo ; 5. parto de armeo ; 6. vicambasadorejo ; 7. pretigi ; 8. birdo parenca je perdrikoj ; 9. barketo. Metu la trovitajn vortojn laŭ la donita sinsekvo unu sub la alian, kaj ŝovu ilin dekstren aŭ maldekstren ĝis vi povos legi en du apudaj kolonoj esprimon el la *Proverbaro* de D-ro Zamenhof. (Legu unue la literojn de la unua kolono kaj poste tiujn de la dua kolono).

Enigmo N-ro 113 : 1. krio - sep ; 2. tipo - ĉar ; 3. baki - tra ; 4. mano - nia ; 5. gemo - sin ; 6. loko - oni ; 7. arto - sed ; 8. tedi - sin ; 9. domo - iel ; 10. nub - sur ; 11. erco - nia ; 12. arbo - tie ; 13. relo - nek ; 14. kiom - aso ; 15. kufo - nur ; 16. tien - per ; 17. lavi - for ; 18. brui - tia ; 19. peto - tie ; 20. raso - dek ; 21. nuko - mis.

El la literoj de ĉiu paro da vortoj vi povas formi novan vorton. La mezaj literoj de tiuj novaj vortoj donos en la donita sinsekvo esprimon el la *Proverbaro* de D-ro Zamenhof.

Enigmo N-ro 114 :

F.L.N.O
A.A.I.I
S.A.A.O
S.C.A.A
B.A.I.O
K.M.L.O
A.R.O.O
I.T.I.I
B.D.U.I
I.T.R.A
V.O.O.O
T.A.E.O
Ĉ.V.O.O

Kompletigu la ĉi flankajn sepliterajn vortojn tiel ke la duaj literoj de la vortoj formas esprimon el la Zamenhofa *Proverbaro*. La vortoj estas ĉiuj oficialaj kaj nederivitaj.

K.A.K.M
F.K.I.A
S.I.U.I
R.M.R.I
A.P.R.I
A.M.N.Ŭ
V.R.O.O
A.I.I.I
K.B.L.O
P.I.A.A
S.A.U.O
L.T.R.O
I.V.R.A

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Rayner al Ges-roj Mervyn kaj Ronald—Del. de U.E.A.—en Nairobi, Kenjo, la 26 julio 1950, filo **Alan David McLaren**.

Young al Ges-roj K. J., en North Cheam, Anglujo, 27 sept. dua filino **Eileen**.

Edziĝo

Jakob-Verstreken. F-ino Yvonne Jakob, filino de la redaktoro de *Esperanto* kaj DM de U.E.A., al S-ro Aug. Verstreken en Antverpeno, Belgujo.

Honorigo

S-ro Hans Jakob, redaktoro de *Esperanto*, estas elektita prezidanto de la Socialdemokratia Partio, sekcio Genevo. Nomo de la membroj kaj legantoj ni esprimas niajn plej sincerajn gratulojn.

Niaj Mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi niaj profundan kondolencon.

Oreškov, S-ro Georgi P., en Koprivstiča, Bulgarujo, 84-jara. Pioniro aligita al Esperanto en 1899. Eldonis broŝurojn, lernolibrojn kaj vortarojn.

Swanson, S-ro G. A., en Werner Robins, Usono, 1 aŭg. 1950.

Vieira Campos, S-ro J., FD de U.E.A. en Belo Horizonte, Brazilo, 21 apr. 1950, 35-jara.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	16.00-16.20	Roma. 19.5m. 31m. I. Radio-difusio Per L'Estero—Esperanto—Via Veneto 56, Roma, Italujo.
Lundo	05.30-05.35	Wien. 513m., 25m., 30m., 41m., 48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a., Wien IV.
	07.15-07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	15.15-15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	14.30-15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
Mardo	01.15-01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
Merkredo	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
Ĵaŭdo	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	08.05-08.20	Paris. 347m., 48.39m. K.
	16.00-16.20	Roma. Kiel dimanĉe.
Sabato	20.00-20.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.15-22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Je la fino de la unua jaro ILEI sin trovas sufiĉe forta kun 5 membraj asocioj : Britujo, Francujo, Germanujo, Nederlando kaj Svedujo, kaj reprezentantoj en 18 aliaj landoj. ILEI havas statistikon pri 1202 geinstruistoj en tiuj landoj.

Fakaj kunsidoj okazis dum la U.K. en Parizo kaj oni diskutis multajn organizajn kaj financajn problemojn. La Direktoro de la Eduka Fakoj de UNESCO, S-ro Lionel Elvin, sendis salutleteron al ILEI en Parizo. En la fakoj de pedagogio la kunsidoj en Parizo estis aparte valoraj pro la diversaj kaj kompetentaj esprimoj de objektivaj opinioj.

Ir
ISA
la jark
prezida
kunven
delegit
Kro
okazis
deman
plurlin
scienc
ISA
memb
ne ka
numer
fiksita
faka a
Makki
Norve
Durra
Alexa
Johan

Kov
dispor
Ĝi est
Dürer
nun d

D

Internacia Scienca Asocio Esperantista

ISAE okazigis du kunvenojn dum la U.K.— la jarkunvenon kiun prezidis Prof. M. Fréchet, prezidanto de ISAE, kaj neformalan diskut-kunvenon kiun prezidis Ing. E. François, franca delegito de ISAE.

Krom la ordinaraj raportoj kaj traktadoj okazis diskuto pri diversaj terminologiaj demandoj. Oni aprobis proponon pretigi plurlingvan propagandilon por uzo ĉe internaciaj sciencaj konferencoj.

ISAE havas delegitojn en 20 landoj kaj 358 membrojn en 27 landoj (membroj en Germanujo ne kalkulitaj). *Scienca Revuo* aperis per kvar numeroj kun sume 160 paĝoj. Statuto estas fiksita kaj ISAE aliĝis al UEA kiel kunlaboranta faka asocio. Vicprezidantoj estas: D-ro G. F. Makkink, Nederlando, kaj S-ro C. Støp-Bowitz, Norvegujo; ĝenerala sekretario: S-ro E. D. Durrant, Britujo; sekretariokasisto: Ing. S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb. Johanneshov, Svedlando.

Kovrilbildo. La kliŝon por la kovrilbildo afable disponigis al ni S-ro Oskar Ziegler, en München. Ĝi estas unu el la 28 bildoj en la libro **Albrecht Dürer: vivo kaj verkado de la fama pentristo**, nun denove havebla ĉe U.E.A. (4ŝ. 9p. afrankite).

ĈE LA SANKTAJ AKVOJ

de J. C. Heer, trad. A. Bader

Tipa svisa romano el la altmontaro
bind. fr. sv. 7.10 aŭ 13ŝ. 6p., afr. 9p.
broŝ. fr. sv. 6.10 aŭ 12ŝ., afr. 9p.

PENSOJ DE ZAMENHOF

la altnivela propagandilo

broŝ. fr. sv. 0.60 aŭ 1ŝ. 3p., afr. 2p.

DU AMOSENTAJ NOVELOJ

du ravaj rakontoj

broŝ. fr. sv. 2.05 aŭ 2ŝ. 6p. afr. 2p.

Mendeblaj ĉe

Universala Esperanto-Asocio,

Rickmansworth

aŭ

Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn,
Svislando

Speciale valoraj libroj

★

La Forto de l'Vero, Adi, originale verkita romano, tre facila, do tre taŭga por komencantoj. La someraj kursoj en Helsingør estas unu el ĝiaj scenejoj.—2'a eldono.—64 pĝ. 3ŝ. 6p.

★

Ferio kun la Morto, Karl Lindquist (dana pastro), originale verkita kriminalromano, kiu katenas la leganton ĝis la fino. Tre facile legebla. 72 pĝ. 4ŝ. 6p.

★

Novaj Esperanto-Historietoj, diversaj aŭtoroj. 70 rakontoj, anekdotoj kaj spritaĵoj. Speciale taŭga por konversaciaj kursoj kaj klubvesperoj. 72 pĝ. 3ŝ. 9p.

★

Pli ol Fantazio, Agnes Bøgh-Høgsted, 5 noveloj, kun altvalora enhavo. Ĉiuj rakontas pri tute simplaj homoj kaj iliaj ĉiutagaj konfliktetoj. 72 pĝ. 3ŝ. 9p.

★

D-ro Dorner, H. L. Egerrup, 208 pĝ. Originala romano verkita de kuracisto pri kuracisto kaj kuracista problemo: arta gravedigo de virinoj. Interesa kaj streĉa. 8ŝil.

Aldonu 10% por afranko

DANA ESPERANTO-ELDONEJO,
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando

Mendebla ĉe

Universala Esperanto Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 231

5-an Oktobron 1950

DELEGITOJ

Britujo

Cardiff (Kimrujo). D : O. Jones, "Penfro", St. Martins Road, Caerphilly. Tel : 294 Taffs Well.
Watford. D : R. A. Newland, 270 Whippendell Road. Tel : Gadebrook 3493.

Francujo

Lannemezan (Htes. Pyr.). D : S-ino M. A. Membrey, route de la Barthe. VD : A. Bourguignon, rue Voltaire. Tel : 69.
 VD : S-ino H. Arbez, rue Thiers. Tel : 58.
Saint-Etienne (Loire). VD : N. Rouays, 8 rue Javelin-Pagnon.
Toulouse. VD : A. Sanchez, 12 barrière de Lombes.
Versailles. D : S-ino M. Goulliart, 6 bis Rue Carnot.

Hispanujo

Moyá (Barcelona). D : R. Molera Pedrals, Calle Hospital 13.
 FD (Turismo) : La D.

Jugoslavujo

Sarajevo. FD (Turismo) : A. Kovačević, Hrasno XIII/4.
Zagreb. FD (Bibliotekaj aferoj) : J. Vajdlj, Podolje 15, Zagreb VI.

Nederlando

Bolsward. D : F-ino S. Buwalda, Hymert 5.
Den Haag. FD (Framasonismo) : A. Hoekma, Laan van Eik en Duinen 20. Tel : 320738.
Zeist. D : R. Slot, Ernst Casinirlaan 21.

Portugalujo

Agueda. D : José Dias Pinto, Barreiras, Aguada.

Turkujo

Istanbul. D : H. Kocaman, Mühürdar Caddesi 81, Kadiköy.

DUMVIVA MEMBRO

Metivier, S-ro Pierre, Durtal, Francujo.

DONACOJ. J. J. W. Huysman 42s. 6p., W. R. Thomas 3s., G. C. Rota 7s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de septembro 1949 :

	1949	1950
Asociaj membroj ..	6893	7092
Individuaj membroj :		
MJ	805	861
MA	4310	4215
MS	361	288
Patronoj ..	16	15
DM	185	207
HM	60	59
	5737	5645
	12630	12737

Jarlibro. La dua parto de la jarlibro eliris en oktobro. Se iu membro ne ricevis ĝin li informu la Centran Oficejon.
 C. C. GOLDSMITH, Sekretario.

INTERNACIA KONKURSO 1950

Stato je la 30-a de Septembro

	Poentoj	Kvoto	%
1. Hispanujo ..	1170	600	195.0
2. Maroko ..	435	250	174.0
3. Izraelo ..	310	250	124.0
4. Germanujo ..	2385	2000	119.2
5. Aŭstrujo ..	815	700	116.4
6. Urugvajo ..	290	250	116.0
7. Sud-Afriko ..	285	250	114.0
8. Finnlando ..	2045	1800	113.6
9. Francujo ..	5770	5200	111.0
10. Aŭstralio ..	980	900	108.9
11. Belgujo ..	2134	2000	106.7
12. Svedlando ..	5210	4900	106.3
13. Brazilo ..	2326	2200	105.7
14. Italujo ..	1495	1450	103.1
15. Svislando ..	1335	1300	102.7
16. Nederlando ..	4991	5100	97.9
17. Britujo ..	11765	12500	94.1
18. Kanado ..	235	250	94.0
19. Danlando ..	2830	3100	91.3
20. Nov-Zelando ..	761	850	89.5
21. Usono ..	2664	3100	85.9
22. Irlando ..	190	250	76.0
23. Argentino ..	755	1000	75.5
24. Islando ..	470	660	71.2
25. Hungarujo ..	915	1400	65.4
26. Norvegujo ..	930	1500	62.0
27. Egiptujo ..	105	250	42.0
28. Pollando ..	1900	4650	40.9

Paul Blaise Memoriga Kaso

Por honori la memoron de Paul Blaise, dum multaj jaroj entuziasma subtenanto de la Skolta Esperanto-Ligo, la Ligo starigis (kun aprobo de S-ino Blaise) Memorigan Kason kun la celoj krei daŭran rimedon gardi la memoron de ŝatata amiko, kaj antaŭenigi la movadon, kiun li tiom amis. La Memorigilo havos la formon de Kaso investita en la nomoj de la Kuratoroj kaj la rento estos uzata por :

ebligi al malriĉaj skoltoj aŭ skoltinoj fariĝi membroj de S.E.L.,
 helpi tiajn skoltojn aŭ skoltinojn partopreni Internaciajn Tendarojn de S.E.L.,
 ĝenerale propagandi Esperanton inter la junularo.

Pluraj donacoj jam estas ricevitaj kaj povas esti, ke amikoj de Paul Blaise volos kuniĝi en ĉi tiu inda klopodo. Donacojn bonvolu sendi (senpere aŭ per U.E.A.) al : Prezidanto de Skolta Esperanto-Ligo, 23 East Dulwich Grove, London, S.E.22, Anglujo, kiu danke kvitancos la ricevon. Kvitanco pri ricevo aperos ankaŭ en *Skolta Mondo*, kiun akiru ĉe S-ro G. Rust, 122 Shirley Ave., Southampton, Anglujo.

Plenan valuton por via mono vi havos, aĉetinte esperantajn verkojn eldonitajn en

FINNLANDO

Gravaj verkoj de tutmonda intereso :

Aleksis Kivi : SEP FRATOJ. Rakonto.

360 paĝoj 12.5×17.5 cm., bona papero, belaj vinjetoj, fidinda traduko.

Prezoj : simpla bindaĵo 13ŝil. 6p.
kun tola dorso 16ŝil.

Lernu koni la spiriton de norda popolo meze de senfinaj arbaroj distranĉitaj de nekalkuleblaj lagoj el la mondfama ĉefverko !

Vilho Setälä : BURGONOJ. Infanoj en poezio kaj fotografio.

80 paĝoj 20.5×29 cm. 76 tutpaĝaj bildoj pri infanoj kaj junuloj, poemoj de la plej gravaj poetoj finnaj.

Prezo : kun tola dorso 15ŝil.

“Jen vera trezoro !” (Teo Jung)

“Nepre havinda verko” (M. Stuttard).

“ . . . esprimas vivrigardon kaj vivmediton, (kiuj) estas personaj, sed samtempe . . . , en la poemoj, vasta kaj profunda esprimo de la finna spirito” (Stellan Engholm)

HELSINKI, Lumo kaj ombro. Albumo al la 400-jara ĉefurbo de Finnlando.

126 paĝoj 20.5×29 cm., kun bildoj tut- kaj duonpaĝaj.

Prezo : kun tola dorso 18ŝil. 6p.

Ĉi tiuj luksaj bildolibroj estas unikaj en la esperanta libraro.

Malmultekostaj verkoj, lingvo kaj preso unuaklasaj.

Aleksis Kivi : LA BOTISTOJ.

138 paĝoj.

Prezo : 2ŝil.

Humorplena komedio el la vivo de finnaj kamparanoj.

“La plej humora verko, kiun mi ekkonis” (W. M. Page)

Aleksis Kivi : LEA. LA FIANĈIĜO.

64 paĝoj.

Prezo : 1ŝil.

Du malgrandaj teatraĵoj : lirika dramo biblia kaj bonhumora komedieto (ludita dum la 14a kongr.).

Ĉu vi timas legi teatraĵojn ? Ĉu vi ne scias, ke ili donas en plej interesa formo la plej naturan ekzercon de interparolo ?

Linnankoski : BATALO PRI LA DOMO HEIKKILA.

60 paĝoj.

Prezo : 1ŝil.

Majstra noveleto de konata finna verkisto.

J. H. Erkko : SPEGULO HOMARANA.

Libreto pri la mondkoncepto kaj vivregularo de homare sentanta poeto.

Dukolore presita sur luksa papero.

Prezo : 1ŝil.

Bela donaceto al via amiko kaj samideano.

Aldonu 10% por sendkosto

Aĉeteblaj ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

kaj la ĉefaj librovendejoj esperantistaj

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI

KVIN TRADUKOJ DE STEPHEN A. ANDREW

William Shakespeare

ROMEO KAJ JULIETO (Romeo and Juliet)

90 paĝoj, broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 2p.

ANTONIO KAJ KLEOPATRO (Antony and Cleopatra)

84 paĝoj, broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 2p.

Prozaj tradukoj de du mondkonataj dramoj.

LA GAJAJ EDZINOJ DE WINDSOR (The Merry Wives of Windsor)

90 paĝoj, broŝurita 3ŝ. 6p., afranko 2p.

Metrika traduko de unu el la plej amuzaj komedioj de la renoma dramaŭtoro.

Olive Schreiner

ROMANO PRI AFRIKA BIENO (The Story of an African Farm)

272 paĝoj, broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 6p.

UNDINO (Undine)

283 paĝoj, bindita 7ŝ. 6p., afranko 6p.

Du tre pensinstigaj sudafrikaj romanoj, kiuj priskribas la vivon en Sud-Afriko antaŭ 50 jaroj.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando, aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO